

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


**Tonkin pri
strategio
(dua artikolo)**



**Programlingvo
paralelas
Esperanton:
Fortho kaj ni**



**15% da subteno
por Esperanto
en Eŭropa
Parlamento**



Aŭstralio, solstara landego

Enhavo

- 21 Nia kongreslando: La loĝantaro de Aŭstralio (Trevor Steele)
- 22 Disvastigi, utiligi, konsciigi (Humphrey Tonkin)
- 23 Eŭropa agado: Ek al la centa EP-ano!
- 24 Nia kongreslando: Invito al Adelajdo (Vera Payne);
Lando el kiu vi volos neniam eliri (Donald Broadribb);
Por via vojaĝsako
- 26 Kotiztabelo de UEA por 1997
- 27 Tutmonde: Zamenhofaj decembroroj
- 28 Eŭropo: Bosnio denove fortas movade (ELBIH)
Radio: Ĉerpu aŭskulturon (AERA)
- 29 Teatro: Replike pri Bulgara Esperanto-Teatro (Belka Beleva)
- 30 Komputado: Fortho kaj Esperanto — paralelaj mondoj? (Marcos Cruz)
- 32 Lingvistiko: Profesoro pri interlingvistiko serĉata;
La kimero de plena posedo (Bernard Golden)
- 33 Recenzoj: *Ĉina ceramiko*, *Enciklopedieto de Ĉinio* (David K. Jordan);
Germanaj biero kaj bierkulturo (Krys Ungar); *Memorlibro omaĝe al*
*Andreo Cseh, Andreo Cseh — la *gaja stelo* kiel "edzperanto"*
(Reinhard Haupenthal); *La infanoj en la arboj* (Harold Brown,
Kerstin Rohdin); *Hungara lingvokurso* (Ilona Koutny)
- 34 Foliume
- 35 Laste aperis
- 36 Forumo: Remi en sama boato bonas por la sano (Csaba Székely);
Kunlaboro devas ebli ĉe samcelanoj (Hermann Schmid);
Estingiloj portempe bezonataj (Nkunku Niansi)
- 38 Loke — Fake
- 39 Oficiala informilo; Anoncetoj
- 40 Nekrologoj: Manuel de Freitas (1910-1996)

Vi trovos

en ĉefa loko (p. 22-23) la duan artikolon de Humphrey Tonkin pri la strategio de UEA, pli precize pri la Strategia Plano publike diskutita en 1988 kaj akceptita de la Komitato en 1989, kiu poste tamen "iom post iom falis en la tagordaj prioritatoj kaj malaperis". Tonkin bedaŭras tion, ĉar li estas konvinkita ke la plano eĉ nun "formas bonan bazon por estonta agado", kun siaj tri prioritatoj de disvastigo, utiligo kaj edukado al tutmonda konscio, kaj tial li invitas al ĝia reekzameno.

Al tutmonda konscio certe rilatas la kongrestemo de la ĉi-jara UK, okazonta en landego kiu jam konstruas multkulturecon inter siaj limoj. En la rubriko "Nia kongreslando" (p. 21, 24-27) LKK-ano Vera Payne varme invitas al la unika kontinento, pri kiu akademiano Donald Broadribb kaj verkisto Trevor Steele transdonas fascinajn informojn kaj impresojn.

Fascinaj estas ankaŭ kelkaj paraleloj inter nia lingvo internacia kaj la komputila programlingvo Forth(o), ambaŭ pioniraj en sia kampo, kies trajtoj kaj eĉ historio montras surprizajn similaĵojn (p. 30-31).

La kovrilo: Rokego en la Granda Rifbariero, unu el la regionoj vizeblaj per antaŭkongresa ekskurso.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktotfino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifito (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ☎+39-6-39-72-61-69; ☐mc8750@mcclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎+31-50-3613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ☎+1-613-565-9279; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

La loĝantaro de Aŭstralio

La sola kontinento kiu samtempe estas ŝtato, Aŭstralio situas ja insule, sed ne izole de la mondaj ĉefluoj. La "multkultura mondo", kies "toleremon kaj justecon" la temo de la 82-a UK en Adelajdo pritraktos, en tiu landego jam ekfariĝas realo. La aŭtoroj de nia kongreslanda sekcio (p. 21, 24-27) prilumas kiel.

Aŭstralio estas preskaŭ same granda kiel Eŭropo, sed loĝas ĉi tie malpli ol 18 000 000 da homoj. Ĉu tio signifas ke estas vastaj ankoraŭ loĝeblaj areoj? Nur se oni evoluigus metodojn krei akvon kaj fekundigi duondezertajn regionojn. Seriozaj sciencistoj argumentas ke la kontinento povus vivteni nur eble 20 000 000 da homoj (je la aktuala vivnivelo).

Malgraŭ la eta nombro, Aŭstralio fariĝas ĉiam pli interesa (eble esperodona?) loko de pli-malpli bone funkcia multkultureco, spite al la traŭmatoj de la lastaj du jarcentoj.

Ĝis la jaro 1788 la kontinento estis la hejmo de la "aborigenoj" (la vorto signifas "ekde la komenco"). Sed kiam estis tiu komenco? Antaŭ 40 000 jaroj? Antaŭ 100 000 aŭ eĉ pli? Kaj de kie ili venis? Ĉu estis diversaj enmigraĵ-ondoj? La respondoj tre varias, kaj ni scias tre malmulte pri tiuj jarmiloj de ilia historio. Oni rajtas tamen konkludi ke ilia kulturo malpli ŝanĝiĝis dum tiu tempo ol ĉiu alia konata; alivorte ke ilia estas la plej antikva el ĉiuj nunaj kulturoj. Tiuj relativaj stabileco kaj manko de teknologiaj novaĵoj tamen ne rajtigas al ni paroli pri "primitiveco" en negativa senco: ili trovis bonegajn manierojn adapti sin kaj pretervivi en ĝenerale malfekunda kontinento.

Britio ekinvasis Aŭstralion en 1788 (tiu vortelekto estas valida, kiel ni nun

cedas). Pro la ekspansio kaj rasismo de tiuepokaj eŭropanoj tiu invado signifis mortoverdikton al la antikva kulturo. Ĉu iaj elementoj el ĝi, eble en kombino kun pli novaj, postvivis, ni ne povas antaŭvidi. Tiuj kiuj nomas sin aborigenoj (kaj multaj estas laŭ aspekto nur parte aborigenaj) konsistigas nur unu procenton de la nuna loĝantaro.

La nombro de aborigenoj daŭre malpliigis dum la 19-a jarcento. La nombro de eŭropanoj malrapide kreskis ĝis la malkovro de oro en 1850, de kiam ĝi rapide obliĝis. Sed venis ankaŭ multaj miloj da ĉinoj. Iom poste venis miloj da "kanakoj" (de pacifikaj insuloj), foje propravole, foje devige, labori en tropikaj regionoj (teorie blankuloj devis ne fari pezan fizikan laboron sub arda suno). La ĉeesto de tiom da homoj el "malsuperaĵ raso", kiuj cetere eble laborus kontraŭ malalta pago, estigis timojn inter eŭropanoj. La rezulto estis la lanĉo de malkaŝe rasisma enmigra politiko nomata "Blanka Aŭstralio". Granda procento de la neeŭropaj enmigrintoj devis foriri.

Dum la dua mondmilito la japana imperia armeo minacis transpreni la kontinenton, kiu tiam havis nur 7 000 000 da loĝantoj. Postmilito la aŭstralia registaro decidis provi rapide kreskigi la loĝantaron por pli bone defendi sin. Sed ankoraŭ regis "Blanka

Aŭstralio": tiuj enmigrintoj venis el la detruita Eŭropo.

Tamen dum la sekvaj jardekoj okazis ŝanĝoj en la sinteno kaj de la registaro kaj de la plimulto de la "blankaj" aŭstralianoj. Sen granda bruo oni forigis la barojn kontraŭ "neblankaj" enmigrintoj. En 1967 oni referendumo agnoskis la aborigenojn kiel civitanojn. Post la fino de la milito en Vjetnamio venis miloj da "boatuloj", homoj kiuj fuĝis per boato kaj celis Aŭstralion. Same kiel en Usono, la publiko en Aŭstralio akre disputis pri la partoprenado de propraj soldatoj en la vjetnama konflikto, sed estis ĝenerala subteno por la nova politiko akcepti tiujn fuĝintojn. Venis rifuĝintoj el centra-amerikaj (aparte Salvadoro) kaj "mezoriantaj" kaj afrikaj landoj; iam estis ankaŭ flueto el sovetblokaj landoj. Pro la politiko de "familia unuigo" parencoj de jamaj enmigrintoj ofte sekvas. Samtempe estas sendependaj enmigrintoj, ofte ĉindevenaj.

Rezulte la stratbildo de aŭstraliaj urboj iĝas ĉiam pli interesa (tiu vorto ĝenus rasistojn, kiuj ja levas la voĉon lastatempe). Ekzemple abundas restoracioj el diversaj landoj. Foje oni apenaŭ divenus en kiu lando oni estas, se mankus la anglalingvaj afiŝoj, reklamoj, ŝildoj. Kaj ĝenerale tiu miksaĵo de diversdevenaj grupoj okazas pace. (Sendube helpas ke ĝenerale Aŭstralio havas altan materian vivnivelon malgraŭ ŝajne permanenta 10-procenta senlaboreco.)

Jes, la perspektivoj por multkultureco estas relative bonaj en Aŭstralio. Foje oni aŭdas la opinion ke se toleremo de diversorigineco ne triumfos en Aŭstralio, la cetera mondo tremu.

Trevor Steele (Aŭstralio)

"La stratbildo de aŭstraliaj urboj iĝas ĉiam pli interesa." Multlingva informtabularo de la komunumo St. Kilda.



Disvastigi, utiligi, kon

**En dua artikolo (la unuan vd. jan., p. 2)
Humphrey Tonkin daŭrigas siajn pri-
pensojn pri la Strategia Plano de UEA.**

En 1988, dum mia prezidanteco de UEA, la Komitato konsideris novan strategian planon por la Asocio. Jam en 1986, kiam, post sesjara paŭzo, mi konsentis denove kandidatiĝi por la prezidanteco, mi emfazis ke mi servos nur dum trijara periodo, do ne rekandidatiĝos. Mi ankaŭ klarigis ke mia ĉefa tagorda punkto estos ellaboro, kune kun ĉiuj elementoj en la Asocio, de bona strategio por la posta evoluigo de la Asocio. Do, ne temis pri la kutima laborplano de antaŭaj jaroj, kun ties listoj de farendaj taskoj, sed pri plano kiu donu kadron por la estonta *strategio* de la Asocio, kaj el kiu eblus formi pli limigitajn laborplanojn por specifaj periodoj kaj celoj. La plano, kiun ni prezentis al la Komitato, estis bazita sur diskutoj kun multaj membroj kaj gvidantoj de la Asocio, sur studo de la funkciado de la Centra Oficejo farita de Gian Carlo Fighiera en 1987, kaj, fine, sur analizo de la fortoj kaj malfortoj de la Asocio, de la plej grandaj ekspluateblaj okazoj por la Asocio kaj de la plej grandaj minacoj kiujn ĝi frontas. Ĉi tiu sistemo de analizo, ĉiam pli vaste aplikata en la strategia planado, nomiĝas en la angla lingvo la SWOT-sistemo (*Strengths* – fortoj; *Weaknesses* – malfortoj; *Opportunities* – ekspluateblaj okazoj; *Threats* – minacoj). Surbaze de tiu analizo de rimedoj kaj obstakloj eblas ellabori realisman laborprinciparon, kiun oni povas daŭre modifi laŭ la ŝanĝiĝantaj kondiĉoj.

La plano ne nur estis diskutata en la Komitato en 1988, kaj abunde en aliaj forumoj dum la kongreso, sed aperis en malneta formo baldaŭ poste ('88 okt., p. 168-177) en la revuo. Amaso da membroj de la Asocio sendis al ni siajn komentojn, kaj multaj komitatanoj gvidis diskutojn ene de landaj kaj fakaj asocioj. La celo estis definitivigi la planon, post modifoj rezulte de la publika diskuto, en la Komitato en 1989. Tio ja okazis, per formala voĉdono, sed bedaŭrinde la Komitato en tiu jaro tiel abunde fintraktis aliajn aferojn en siaj kunsidoj ke restis tre malmulta tempo por debato pri tiu ege grava tagordero, kaj sekve malmulta tempo por plena kompreno de la implicoj kaj celoj de la plano. Mi mem, kiel eksa prezidanto de la Asocio, ne estis en tre forta pozicio insisti pri plenumo de la plano, kiu estis poste diskutita de la nova Estraro (en kiu mi ne membris), sed iom post iom falis en la tagordaj prioritatoj kaj malaperis.

Retrospektive, mi nun bone komprenas ke estas malfacila tasko klopodi fiksi la vojon irendan por aliaj personoj, se oni mem ne estas ligita al la teamo. Mi tamen volas sugesti ke en la nuna tempo, kiam denove ekestas diskutoj en la sino de UEA pri la direkto kaj strategio de la Asocio, ni resendu nin al tiu strategia plano de 1989, kiu ankoraŭ hodiaŭ prezentas bonan bazon por la plua evoluo. Mi volas emfazi ke ne temas pri “mia” plano, krom en la senco ke mi iniciatis kaj redaktis ĝin, sed pri “nia” plano,



Nia ĉefa prioritato, disvastigo, tro dependas de la laboro de sindediĉaj unuopuloj. (De maldekstre: ELNA-oficistoj Miko Sloper kaj Ionel Onet semajnfino por Esperanto dum aranĝo en Berkeley, Kalifornio.)

en la senco ke multaj homoj en la Asocio partoprenis la diskuton, helpis en la analizo kaj kontribuis per siaj ideoj.

Fortoj, malfortoj, ebloj, minacoj

Surbaze de la diskutoj, la plano identigis ses apartajn *fortojn* de la Asocio, kiuj estas: lojaleco de la membroj, facila komunikado kun ĉiuj membroj en ĉiuj mondopartoj, la ekzisto de reto de organizaĵoj (inkluzive de landaj asocioj), la relativa forteco de la junulara movado por Esperanto, la alta nombro de instruistoj inter la membraro, kaj la ĉiujare okazantaj Universalaj Kongresoj. La emfazo pri la junularo eble venos kiel ioma surprizo: la junularo ofte plendas pri sia malforteco. Tamen, kompare kun la 50-aj kaj 60-aj jaroj la junulara movado estas nombre nepre pli forta, kaj ĝia agado nepre vastiĝis. Se temas pri instruistoj, tiu profesia kapablo povus bele ligiĝi kun la neceso disvastigi la lingvon, kiel ni poste vidos.

Malfortoj estis same ses: amatoreco en la agado por Esperanto (ni emas ripeti niajn erarojn; nia agado ofte ne estas daŭra kaj konstanta), manko de lerniloj kaj instruiloj (ili ofte estas malnovaj aŭ netaŭgaj), manko de kunordigo ene de la diversaj organizaĵoj, manko de homaj rimedoj, manko de financaj rimedoj, kaj troa eŭropismo. Rilate ĉi lastan, kvankam la laboro de la Asocio estas efektive tutmonda hodiaŭ, ni daŭre emas rigardi Eŭropon kiel nian administran kaj eĉ spiritan centron, kaj ni ne donas adekvatan prioritaton al la laboro en aliaj kontinentoj.

Kiel *ekspluateblajn okazojn*, la plano identigis same ses aferojn: la Universalajn Kongresojn (kiujn ni ankoraŭ ne plene ekspluatas por konstrui nian kulturon kaj instrui la lingvon), la tutmondigon de la Esperanto-movado (do la etendiĝon preter Eŭropon), la publikan atenton kiu rezultis el la Jubileo de Esperanto en 1987 (plus la rezolucio de Unesko en 1985), turismon, modernan komunikan teknikon, kaj la komunikan reton jam ekzistantan ene de la Esperanto-movado. Notu interalie la atenton al la “moderna komunika tekniko,” ĉe kiu, laŭ la plano, UEA tiam postlamis.



Kiel ses ĉefajn *minacojn* la plano nomis: mankon de lingva kapablo ene de la Esperanto-movado, mankon de interna unueco en la movado, troan dependon de la laboro de unuopuloj, kreskon de la internacia forteco de la angla lingvo, rompon de la lingva barilo per moderna tekniko, kaj la neceson konkurenci kun aliaj sociaj intereso, tiel ke homoj ne trovas tempon por Esperanto aŭ ne dediĉas al ĝi sufiĉan atenton inter konkurencaj intereso.

Ĉiu ero en tiu listo de 24 karakterizoj meritis tie ĉi pli profundan klarigon, sed la ĝenerala bildo tamen fariĝas klara: la plano prezentas Asocion kiu tro nesisteme laboras, kiu dependas tro multe de disaj amatoraj fortoj, kaj al kiu mankas sufiĉaj rimedoj. Aliflanke, la fakto ke ni parolas Esperanton igas la Asocion unike komunikkapbla interne, la energio kaj lojaleco de la membroj konsistigas grandan forton mobilizeblan, kaj la institucioj de la Esperanto-movado povus esti pli bone ekspluatataj por plibonigi kaj la financajn kaj la homajn rimedojn.

Tri kernaj prioritatoj

La kerno de la plano mem, kiu sekvas el tiu ĉi analizo, estas tute mallonga. Ĝi rekomendas ke la Asocio koncentru siajn fortojn, kune kun la landaj kaj fakaj asocioj, al tri ĉefaj prioritatoj. “Ĉiuj agadoj de UEA devas esti juĝataj” laŭ sia “kontribuo al plenumo” de tiuj prioritatoj.

La unua kaj ĉefa prioritato, laŭ la plano, estas *disvastigo de Esperanto* — per du rimedoj: informado kaj instruado. Se efektive la fenomeno Esperanto estas socio kaj ne nur movado, ni ne rajtas supozi ke unuopuloj adekvate, se entute, informos la ceteran mondon pri Esperanto aŭ laboros por ĝin instrui. Ĉe ambaŭ tiuj taskoj oni facile perdas kuraĝon. Unu el la ĉefaj celoj de la Asocio devas esti doni al tiuj homoj la bezonatan kuraĝon kaj maksimumigi ilian efikecon per bonaj materialoj kaj bonaj edukaj programoj. Ni faru tion ne ĉar ni sentus ke UEA, por tiel diri, *estas* la movado, sed ĝuste ĉar ni konscias ke la movado estas pli vasta ol UEA. Unu el la roloj de UEA estas konsciigi la Esperanto-komunumon pri la neceso renovigi kaj plivastigi sin.

Dua granda prioritato estas la *utiligo de Esperanto*, do helpo al la Esperanto-socio ke ĝi apliku Esperanton “en

ĉiuj sferoj de la homa vivo” kaj riĉigu la lingvon kaj kulturon de Esperanto. La plano specife aludas al la graveco konservi la lingvan unuecon kaj fortigi la Esperanto-movadon “laŭnombro kaj laŭkvalite.”

La tria granda prioritato emfazas la rolon de UEA en la ekstera mondo, kaj ĝi reiras al unu el la fruaj celoj de la Asocio. Temas pri *edukado al tutmonda konscio*. UEA, laŭ la plano, havas respondecon disponigi sian scion pri lingvaj demandoj “al la ekstera socio,” faciligi la interŝanĝon de ideoj pri “mondaj demandoj” en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj kunlabori kun internaciaj organizaĵoj. Tiel la ekstera mondo rekonos la Esperanto-komunumon kiel seriozan iniciaton, kaj la membroj de la Asocio fariĝos pli bone informitaj pri la grandaj mondaj demandoj en kies kunteksto ili laboras por Esperanto.

La Strategia Plano de la Asocio ne estas, do, finita kaj kompleta plano, sed strategia principaro, surbaze de kiu oni povas fiksi prioritatojn kaj analizi la efikecon de la laboro. Nuntempe UEA laboras esence sen ĝenerale akceptita plano (kvankam la plano de 1989 neniam estis oficiale nuligita). Ne estas do surprize se mankas sento de strategia direkto. Tiu manko de direkto maltrankviligas la prezidanton de la Asocio: nun li kaj la ĝenerala sekretario, kunlabore kun kelkaj komitatoj, diskutas inter si pri la estonta strategia vojo. Mi samopinias ke ni ne rajtas ĝui la lukson de senplana laboro, kaj mi estas konvinkita ke la strategio de 1989 formas bonan bazon por estonta agado.

Humphrey Tonkin

Office of the President

University of Hartford

West Hartford, CT 06117, Usono

EŬROPA AGADO

Ek al la centa EP-ano!

Dank’ al kampanjo iniciatita de Germain Pirlot, la nombro de eŭropaj parlamentanoj kiuj subtenas Esperanton kreskis per 100% en unu jaro.

Kun la helpo de kunordigantoj en la landoj de Eŭropa Unio, Germain Pirlot (Steenbakkersstraat 21, BE-8400 Oostende, Belgio) daŭrigas sian inform-agadon (nov., p. 189) pri Esperanto al la membroj de Eŭropa Parlamento.

La nombro de eŭro-parlamentanoj kiuj “pli-malpli forte subtenas eventualan uzadon de Esperanto por helpi al solvado de la lingva problemo en Eŭropa Unio”, kreskis al duoblo de januaro ĝis la 15-a de decembro 1996: de 47 al 94 (de 7,5% al 15% de ĉiuj EP-anoj). Troviĝas subtenantoj en ĉiuj politikaj grupoj de Eŭropa Parlamento, inter deputitoj el ĉiuj EU-landoj krom Grekio kaj Nederlando.

Laŭ la sperto de Pirlot, “reagoj de EP-anoj el diversaj landoj pruvas ke ili bezonas trafajn informojn pri la realaj ebloj de Esperanto kaj pri ĝiaj konkretaj aplikadoj. Ankoraŭ tro ofte iuj el ili opinias ke la celo de e-istoj estas forigi la aliajn lingvojn je eŭropa nivelo profite al la ununura Esperanto”.

Pirlot kompilis dosieron por tiuj kiuj volas kontakti siajn eŭropajn parlamentanojn, kaj li bonvenigas kunlaborantojn.

★

Invito al Adelajdo

Venu al Aŭstralio en '97! Finfine kaj unuafoje okazos en nia lando Universala Kongreso de Esperanto.

Kiel bonaj gastigantoj ni jam de kelka tempo planas kaj laboras, celante memorindan kunvenadon. Kelkaj el vi jam vizitis nian vastan kontinenton; al la cetero ĝi restas mistere nekonata. Vizitu nin. Vi ne desaponiĝos.

Ĉion kion vi atendas de UK ie ajn, vi trovos en Adelajdo, la ĉefurbo de Sud-Aŭstralio. Komfortan loĝadon diversprezan, bongustajn manĝaĵojn, kontentigajn ekskursojn, unikajn bestojn, brilajn prelegojn, kapablajn helpantojn, butikumadon laŭdezure multaŭ malmultekostan, modernan kaj antikvan kulturojn, naciajn kaj internaciajn koncertojn.

La kongresejo estos la bela Adelajda Kongres-Centro, kiu situas meze de la urbocentro kaj tuj apud la kazino! Ĝi facile atingeblas de ĉiuj loĝejoj, plejparte piede. Dumvoje ĝuu antaŭkongreson, kaj nepre partoprenu en postkongreso. Vi povos traveturi ĉi tiun unikan landon, depende de via tempo-kaj monohavo. Krom viziti la famajn Havenponton kaj Operdomon de Sidnejo, pensu pri pli-malpli longaj vizitoj ankaŭ al la aliaj ŝtatoj. Se vi venos al Perto, la ĉefurbo de Okcident-Aŭstralio, mi mem montros al vi mian "vilaĝon" belan, kvankam iom izolitan de la cetera mondo. (Parenteze, ĉu vi legis pri David Dicks, kiu ĵus ĉirkaŭiris la mondon sola en sia velŝalupo *Sea-flight* kaj hejmenvenis al Perto post naŭmonata vojaĝo sen tuŝi landon aŭ

homon? David "festis" sian 18-an naskiĝtagon dumvojaĝe! La junulo tiel velveturis en la Guinness-libron de rekordoj kaj ankaŭ en la historion.)

"Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratinoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas. . . ." Nian temon, "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo", aprobus d-ro Zamenhof. Aŭstralio estas multkultura lando, kaj ni strebas al toleremo kaj justeco al ĉiu.

Venu kaj helpu evidenti ke Esperanto abundas je amikeco kaj ĝojo, ke la interna ideo floras. Ni avidas bonvenigi vin!

Vera Payne

Loka Kongresa Komitato

Lando el kiu vi volos neniam eliri

Kial denaska usonano fariĝas volonta kaptito de la aŭstria maniero vivi? Jen klera kaj loga respondo.

Kiam mi estis infano, loĝanta en Usono, dek du aŭ dek tri jarojn aĝa — tio do okazis en la lasta geologia epoko —, Aŭstralio estis por mi tute nekonata lando, iom pli malproksima ol la luno. Ĉe mia fraŭlina praonklino mi legis ĝeneralan informlibron pri la mondo, kiu diris al mi eble du-tri alineojn pri Aŭstralio. El ĝi mi eksciis ke aerpoŝta letero bezonas ĉ. du monatojn por atingi tiun foran kontinenton, kaj ke ĝi famas pro ĉevalkonkursoj (mi kredas ke estis eĉ malgranda foto pri ĉevalo). Mi memoras nenion plian el la artikolo, sed ial Aŭstralio restis en mia menso kiel nepre vizitinda lando.

Dum postaj jaroj, inter infaneco kaj adoltago, mi akiris kelkajn kolorajn fotojn pri Aŭstralio, kaj per stereoskopo mi povis vidi la ĉevalkonkurson tridimensie, kaj dekon da aliaj "kuriozaj" uloj kaj aĵoj, inkluzive kanguroon kaj la Havenponton de Sidnejo, kiun la fotistoj ial opiniis nepre videnda. Ĉu mi demandis min kial ĉevalkonkurso kaj ponto estas nepre diskonigendaj? Mi ne plu memoras, tamen malgraŭ la fotoj mia deziro viziti Aŭstralion grandiĝis.

Nu, multajn jarojn poste la deziro plenumiĝis: jam de tridek kvin jaroj mi estas en Aŭstralio, kaj tiu "vizito" espereble neniam finiĝos, almenaŭ ne dum la baldaŭaj jaroj!

Kial do Aŭstralio? Libera lando, kie neniuj havas devon kunporti identigilon ian ajn . . . lando kies kontinenta vasto enhavas ses urbojn kaj kelkcent vilaĝojn, sed plejparte dezertojn . . . kie triono de la loĝantoj estas enmigrintoj, kaj la gepatroj de preskaŭ plia triono estis enmigrintoj . . . en kiu mia loĝejo situas 133 kilometrojn for de la plej proksima urbo (Perto), kiu

siavice foras dumil kilometrojn de la plej proksima urbo (Adelajdo) . . . en kiu troviĝas la plej granda porkapa nombro da vidbendaparatoj en la mondo . . . kie televido per kablo kaj per satelito apenaŭ ekzistetas, ĉar la loĝantaro ne volas pagi monon por vidi televid-programojn kutime senpagajn . . . kie oni konas nur du vere sanktajn religiojn: futbalon kaj kriketon . . . kie la luno ŝajnas al ni pli proksima ol Eŭropo . . . kie la tuta nacio haltas unu tagon ĉiujare por rigardi ĉevalkonkurson en Melburno, ĉe kiu la virinoj portas la plej absurdajn ĉapelojn el penseblajn, speciale preparitajn por tiu speciala evento . . . kie se oni vidas viron kiu surhavas formalan kompletan, oni scias ke li povas esti nur mormona misiisto . . . kie en taksio oni nepre devas sidi apud la ŝoforo, por ne ŝajni aroganta . . . kie oni eldonas kaj legas proporciojn plej multe da libroj en la angallingva mondo . . . kie la Havenponto (kaj nun ankaŭ la Operdomo) en Sidnejo estas unu el la Sep Mirindaĵoj de la Mondo.

Malgraŭ ĉio ĉi, ne timu! La loĝantoj estas homoj. Ili parolas lingvon kiu, se vi estas sperta pri la angla lingvo, eble fariĝos komprenebla por vi post kelkaj monatoj. Sed ja ne gravas, jam ĉiu tria loĝanto estas enmigrinto kies

Praga Manifesto

Ĝis redaktotfino la nombro de subskriboj al la Praga Manifesto kreskis al 4819.

La Informa Fako daŭre disponigas diverslingvajn tradukojn laŭ peto. Elektronikaj variantoj en pluraj lingvoj estas legeblaj en la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio: <http://www.esperanto.se/>.



posedo de la angla estas malpli bona ol la via...

Por mi plej gravas la neformaleco de la vivkutimoj, la libereco, la eblo veturi dum horoj sen trovi urbon, vilaĝon, ofte eĉ domon — en preskaŭ ĉiu parto de la kontinento. (Se vi emas al malklostrofobio, tamen ne timu: urbokompleksego kovras grandan kvankam tre mallarĝan parton de la orienta marbordo.)

Sed ne tro anticipu strangaĵojn. Vi verŝajne vidos kanguruojn kaj koalojn kaj emuojn nur en zoologiaj ĝardenoj kaj specialaj rezervejoj, aŭ kuŝantajn mortinte sur kamparaj ŝoseoj. Vi ja aŭdos la gajan ridadon de kukaburoj en la frua mateno, kaj vidos glorbilajn birdojn flugantajn libere (sed verŝajne ne en la dense loĝataj urbopartoj). Nepre vi vidos aborigenojn, sed ne atendu nudulojn kun farbitaj vizaĝoj kaj bumerangoj; vi vidos nur normal-aspektajn homojn kun iom nigra haŭto kaj ordinaraj vestoj, kiuj parolas la normalan aŭstralian anglan lingvon. Fakte, la bumerangojn en la butikoj oni plejparte importas el Honkongo aŭ Tajvano.

Rilate al manĝaĵoj: Nu, aŭstralianoj amas viandon. Ni kutime manĝas laŭkape plej multe da viando en la mondo (kvankam rivalas kun ni tiurilate Ar-

(daŭrigo sur p. 27)

Por via vojaĝsako

Aŭstralia antologio. Red. Alan Towsey. Pizo: Edistudio, 1988. 431p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Serio Oriento-Okcidento n-ro 25. Poemoj, kantoj, noveloj, romanoj kaj eseoj de Aŭstralio, kun biografiaj detaloj kaj glosoj. 75,00 gld.

Aŭstralia-Esperanta vortaro. R. Harry, V. Gueltling. Bentley: Aŭstralia E-Asocio, 1990 (3-a eld.). 54p. 21cm. Ilus. Vortoj kaj esprimoj specifaj por Aŭstralio. 8,40 gld.

Aŭstralio, lando kaj popolo. A. Delsudo, L. Laiho. Leipzig: Hirt & Sohn, 1927 (!). 93p. 21cm. Kia ĝi estis antaŭ 70 jaroj? Fotoj, mapo. Bind. 6,00 gld.

Bib la koalido: Lagotago. Christopher Eaton. Ilustris Vanessa Eason. El la angla trad. Gaye Phillips. Adelaide: National Parks Foundation of South Australia, 1996. 22p. 18x20cm. Trilingva eldono: angla, japana, Esperanta. Koloraj ilus. Pri portempa malapero kaj saviĝo de koalido; por infanoj. 6,00 gld.

Esperanto en Aŭstralio 1905-1985. Historio de Aŭstralia E-Asocio. Ray Ross. Brisbane, 1985. 117p. 26cm. 13,20 gld.

Frank Reginald Banham. Audrey Bruton. AEA, 1991. 36p. 21cm. Vivoskizo de aŭstralia movada pioniro. 5,40 gld.

Legendoj de Aŭstraliaj Aborigenoj. La Pratempo / Brolgo. Komp. C.P. Mountford. Poemigis "Rickety Kate". El la angla trad. membroj de AEA. Brisbane: AEA, 1993 (2-a eld.). 52p. 21cm. 32 legendoj proze kaj unu poeme. 10,20 gld.

Sep junaj aŭstralianoj. Ethel Turner. El la angla trad. Ruth McGrath. Bakers Hill kaj Beverley: Bookleaf Publishing, 1995. 86p. 30cm. Ilus. La unua porinfana klasikaĵo aŭstralia. 36,00 gld.

Sur la bordo. Nevil Shute. El la angla trad. Kenneth G. Linton. Sydney: AEA, 1983. 254p. 21cm. Pri la minaco de nukleaj armiloj, kun Melbourne kiel scenejo. 15,00 gld.

Krimrakontoj de Ronald C. Gates

Kolera afero. Antwerpen: FEL, 1993. 88p. 21cm. 12,00 gld.

Morto de sciencisto. Antwerpen: FEL, 1994. 83p. 21cm. 12,30 gld.

Refoje krimnoveloj sep. Matraville: AEA, 1994. 90p. 21cm. 12,90 gld.

Sep krimnoveloj. Matraville: AEA, 1993. 84p. 21cm. 12,30 gld.

La septaga murdenigmo. Antwerpen: FEL, 1991. 76p. 20cm. 12,60 gld.

Ralph Harry

Aventuroj en Esperantujo. Sidney: AEA, 1994. 81p. 21cm. Travivaĵoj de diplomato per Esperanto. Bazita sur radio-paroladoj. 12,00 gld.

Kenneth G. Linton.

Kanako el Kananam. Rickmansworth: EPC, 1960. 200p. 19cm. Ilus. Bind. Kromkovrilo. Travivaĵoj en kanaka regiono de Nov-Gvineo. 14,40 gld.

Trevor Steele

Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen. Vieno: Pro Esperanto, 1994. 148p. 23cm. Romano pri spertoj de juna anglo kiel sociala helpisto en la Germanio de la 60-aj jaroj. 31,20 gld.

Memori kaj forgesi. Noveloj el la Norda Montaro. Vieno: Pro Esperanto, 1992. 143p. 21cm. Rakontoj bazitaj plejparte sur infanaĝaj spertoj en la Aŭstralio de la 40-aj kaj 50-aj jaroj. 31,20 gld.

Remember and forget. Short stories from the northern mountains. El Esperanto trad. la aŭtoro. Vienna: Pro Esperanto, 1995. 123p. 23cm. Traduko de *Memori kaj forgesi* + du novaj noveloj. 24,00 gld.

Sed nur fragmento. Chapeco: Fonto, 1987. 448p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Biografia romano pri rusa antropologo en Suda Pacifiko fine de la 19-a jarcento. 48,00 gld.

Internacia Semajno de Amikeco

Kiel ĉiujare, la lasta plena semajno de februaro (17-23) staros sub la devizo "Amikeco trans limoj". Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de internacia lingvo, ĝi estas aparte taŭga okazo por aranĝi komunan eventon kun neesperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.

KOTIZTABELO DE UEA POR 1997

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	8	20	50	30	20	100
Aŭstralio/dolaro	12	31	78	47	28	156
Aŭstrio/ŝilingo	100	250	630	400	240	1260
Belgio/franko	300	740	1850	1180	700	3700
Brazilo/guldeno	8	20	50	30	20	100
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Bulgario/guldeno	8	20	50	30	20	100
Ĉeĥio/krono	150	350	900	550	350	1800
Danio/krono	55	140	350	225	130	700
Finnlando/marko	45	110	270	170	100	540
Francio/franko	50	120	310	200	120	620
Germanio/marko	14	36	89	57	34	178
Greklando/drakmo	1500	3700	9300	5900	3600	18 600
Hispanio/peseto	900	2200	5500	3500	2100	11 000
Hungario/forinto	750	1900	4800	2900	1750	9600
Irlando/pundo	6	14	36	23	14	72
Islando/guldeno	16	40	100	60	36	200
Israelo/guldeno	13	33	82	49	29	164
Italio/liro	13 000	33 000	82 000	52 000	31 000	164 000
Japanio/eno	1100	2900	7200	4300	2600	14 400
Kanado/dolaro	13	32	81	49	29	162
Korea Resp./guldeno	13	32	79	47	28	158
Nederlando/guldeno	16	40	100	64	38	200
Norvegio/krono	60	160	390	230	140	780
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	34	190
Pollando/guldeno	8	20	50	30	20	100
Portugalio/eskudo	1000	2500	6200	3900	2400	12 400
Rusio/guldeno	8	20	50	30	20	100
Slovakio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Sud-Afriko/guldeno	14	36	90	54	32	180
Svedio/krono	70	160	400	250	150	800
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	10	24	60	36	22	120
TARIFO A/guldeno	11	26	66	40	24	132
TARIFO B/guldeno	8	20	50	30	20	100

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto* (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*)

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

TUTMONDE

Zamenhofaj decembreroj

Atendante pliajn raportojn pri la tutmonda festo de Esperantujo, ni informas pri kvin el la unuaj eventoj pri kiuj ni sciigis.

Albanio

Prof. Bardhyl Mezini estis intervjuita de la naciaj televido kaj radio. En la naturscienca fakultato membroj de Tirana E-Societo aŭskultis rakonton pri la vivo de Zamenhof kaj spektis movadan video-filmon. (Interredaktore)



Donghu E-Domo en Wuhan (Ĉinio), dum pasintsonera renkontiĝo

Ĉinio

Pli ol tridek e-istoj de tuta Ĉinio kunigis por la 13-a Hubei-a Kongreso de Esperanto, samtempe Zamenhof-festo (14 dec.), en la urbego Wuhan. Ili kunloĝis en Donghu Esperanto-Domo, parto de privata domo de ĵurnalisto PENG Zhengming. La domo jam kolektis preskaŭ ĉiujn E-librojn eldonitajn en Ĉinio kaj multfoje akceptis turismajn geamikojn. (Peng Z.)

Italio

Ĉu loĝantoj de Triesto trovos tempon, antaŭ la jarfinaj festoj, por rigardi ekspozicion pri la 90-jariĝinta Triesta E-Asocio? La duboj de la TEA-anoj kiuj organizis la naŭ-tagan eventon estis forigitaj de la aprezoj de la vizitantoj. La loka ĵurnalo raportis ne malpli ol ses fojojn pri la ekspozicio, ankaŭ per fotoj. (*La Eta Gazeto*)

Kanado

Wally du Temple, LKK-estro de la Vankuvera UK (1984), denove elmontris sian organizan talenton, igante la lastatempe rutinan Zamen-

hof-tagon en Victoria (Brita Kolumbio) pli interesa. Jam en 1995 lia ideo inviti medi-protektajn organizojn por interŝanĝi "internajn ideojn" trovis bonan akcepton. Ĉi-foje li riskis pli, luante tutan teatron por koncerto de konataj kantistoj, kiujn li mem persvadis al tri-hora prezento senhonoraria, omaĝe al "Patrino Tero". Enkonduke al la senpaga koncerto la 15-an de dec., kies publiko plenigis la teatron, du Temple parolis pri la Zamenhof-tago kaj la Praga Manifesto, presita sur la programbulteno. Post tiu sukceso, du Temple jam rezervis la teatron por la Zamenhof-tago en 1997. (O. du Temple)



Venezuelo

La eksterordinare sukcesan Zamenhof-vesperon de Venezuela E-Asocio (Karakaso, 6 dec.) partoprenis Slawomir Kulesza, kultura ataŝeo de la pola ambasado, kiu per hispanlingva paroladeto pri Zamenhof vigle kontribuis al la agrabla etoso, rememorante ankaŭ sian junaĝan esperantistecon. (Interredaktore)

(daŭrigo de p. 25)
gentino, kies anoj diversjare manĝas laŭkape kelkajn gramojn pli). Fruktoj abundegas, dum ĉiu sezono de la jaro. La tutmonda fundamenta manĝaĵo, pico, troveblas ĉie kaj ĉiam. Ankaŭ restoracioj ĉinaj, vjetnamaj, italaj; kaj en ĉiu el la ses urboj vi trovos verŝajne ĉiun nacian kuirarton kiun vi povas nomi.

Pri vestoj: Estas vintro en Aŭstralio dum la kongresperiodo (julio), do pluvmantelon vi nepre bezonos. Kaj plurajn varmajn (sed ne tro dikajn) puloverojn. Ne forgesu ĝinzojn diverskolorajn, ili estas preskaŭ la nacia kostumo. Ĉapelojn neniuj portas, escepte en Melburno dum la fama ĉevalkonkurso. Viro rajtas porti kravateton (kutime ankaŭ ĉemizon iaspecan, kaj pantalonon), sed li riskas mokiĝi.

Pri mono: nepre kunportu vian karton Visa aŭ Mastercard. Kaj abundan monon aŭstralian — la prezoj ne estas altegaj, kaj la aĉetindaĵoj superabundas. Ke ekzistas alia mono en la mondo krom la aŭstralia, neniuj ĉi tie scias, do forgesu viajn usonajn dolarojn, britajn pundojn, frankojn,

markojn kc. En la vendejoj oni kutime ne marĉandas; trinkmonon oni kutime ne donas, nek en restoracioj, nek en taksioj, nek aliloke, krom se oni volas senti sin nekutime malavara, kaj ĝin neniuj atendas.

Nepre ne forgesu vizon, sen ĝi nur nov-zelandanoj povas eniri Aŭstralion, kaj estas iom malagrabla informiĝi ĉe la aerhaveno ke oni devos tujtuje refluigi al sia hejmlando! Sed enirinte la landon forgesu viajn vizon kaj pasporton, neniuj interesiĝos pri ili, tute neniuj, neniam, nenial.

Kaj, plej ĉefe, sentu vin kiel hejme en Aŭstralio. Ridetu. Memoru ke tempo abundas, do ĝuu kion vi faras dum vi ĝin faras. Vi amos la popolon, la popolo amos vin.


Donald Broadribb

Redaktoro de Esperanto sub la Suda Kruco, organo de Aŭstralio kaj Nov-Zelanda E-Asocioj

kukaburo: aŭstralia alciono, granda brun-blanka birdo kun ruĝa voĉo kies voko similas al homa ridado (Aŭstralia-Esperanta vortaro, R. Harry-V. Guelting, 1990)



Ĉapelulino ĉe ĉevalkonkurso



Aborigeno el la tribo Gagaĝu

Eŭropa Esperanta

Kultura Semajno



9 tagoj plenaj de informo, distreco, internacieco kaj Esperanto!
La plej granda Esperanta aranĝo en Eŭropo en 1997

Eŭropa Esperanta Kultura Semajno konsistas el:

- 10/05 - 13/05/1997 Esperanta Kultura Festivalo en Aalen (Aliĝu baldaŭ, ĉar la unuaj 60 partoprenantoj el la t.n. B-landoj ricevas subvencio de po 40 markoj por loĝado.)
- 13/05 - 16/05/1997 Eŭropa Junulara Parlamento en Stuttgart; paralele: antaŭkongresa ekskursaro
- 16/05 - 19/05/1997 Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart

Mendu la duan bultenon kun detalaj informoj, aliĝilo kaj mendilo por loĝado kaj ekskursoj ĉe Esperanto Stuttgart, Dachlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart; tel. +49 / 711 / 138 89 80, faks. +49 / 711 / 138 89 82

Bosnio denove fortas movade

Laŭ raporto verkita en oktobro, la internaciaj kontaktoj de esperantistoj en Bosnio kaj Hercegovino iom plivigliĝas.

La bosniaj balotoj okazintaj la 14-an de septembro altiris grandan mondan atenton, interalie ĉar ili okazis sub la kontrolo de Organizo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (OSKE). Inter la 1200 multnaciaj observantoj troviĝis almenaŭ du E-parolantoj. D-ro Wim de Smet el Belgio deĵoris en Sarajevo, kaj Sergej Perevertajlo el Uzbekio en Zenica. Kvankam la oficejo de OSKE ne konsentis pri aparta kunveno de E-parolantaj observantoj, kiun proponis E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH), de Smet kaj Perevertajlo havis plurajn utilajn kontaktojn kun lokaj e-istoj.

Dum sia trisemajna restado en Sarajevo, d-ro de Smet la 8-an de septembro prelegis antaŭ trideko da Sarajevaj esperantistoj pri Ruando, Gabono kaj Surinamo, kiujn li gastprofesore vizitis dum la lastaj jaroj de sia universitata kariero. Apartan atenton de la aŭskultantoj altiris la situacio en Ruando, pro la tragikaj eventoj en tiu lando similaj al la bosniaj kaj pro la senskrupula genocido kontraŭ la hutua popolo.

En Sarajevo komenciĝis novaj E-kursoj en kvar elementaj lernejoj: instruas Dženita Zvirac, Samir Ribić,

Nimeta Kulenović kaj Feta Zvirac. Krome, por 15 partoprenintoj de pasintjaraj kursoj Azra Ĉolić gvidas superan kurson. La interesiĝo pri E-instruado en lernejoj tre kreskis post la milito. ELBiH estis invitita de Radio Sarajevo prepari sesmonatan kurson por eduka programo. Tamen, pro la detruigo de multaj havaĵoj, draste mankas lernolibroj, vortaroj kaj alia instrumaterialo.

“Regule-malregule en la bosna lingvo” estas manlibro kiun aŭtoris d-ro Senahid Halilović, destinita por bazlernejoj. Krom pri lingvaj regulaĵoj, la 120-paĝa libro populare instruas pri la lingva fenomeno kaj la lingva situacio en la mondo. Trionpaĝa tute ĝusta artikolo temas pri planlingvoj, kun aparta emfazo pri Esperanto, kaj duona paĝo tre objektive prezentas Esperanton mem. La manlibro, eldonita en 30 mil ekzempleroj, estas duonoficiala lernilo, uzata de instruistoj pri la bosna lingvo en ĉiuj bosniaj lernejoj. Ĉar ĝi tre populariĝis inter la loĝantaro, la manlibro estas nun sendube ankaŭ la plej efika propagandilo pri Esperanto kaj la E-movado en Bosnio.

Inter la 5-a kaj la 20-a de oktobro realiĝis ambicia projekto pri vizito de Sarajevaj lernejoj el Novi Grad al la franca urbo Saint Nazaire, dank’ al la Komitato “Sarajevo–Saint Nazaire”, en kiu tre aktive kunlaboris esperantistoj de la du urboj. En la Sarajeva delegacio, kiu konsistis el 32 lernejoj kaj kvin plenkreskuloj, troviĝis du esperantistaj infanoj kaj Mustafa Resulović, estrarano de ELBiH. En Saint Nazaire ili estis ege amike akceptitaj en la domoj de lokaj esperantistoj. La tuta projekto realiĝis fakte dank’ al efika uzo de Esperanto en la korespondado kaj rilatado inter la du urboj, kiujn ligas iom simile tragika milita historio.

Fratinoj Sanja kaj Snježana Bokulić el Rijeka estas la unuaj kroataj esperantistoj kiuj vizitis Sarajevo dum la lastaj kvin jaroj. Dum mallonga restado komence de oktobro ili renkontiĝis kun kelkaj Sarajevaj esperantistoj, interalie por transdoni librodonaĵojn de Rijekaj esperantistoj por Sarajevaj kursanoj. Sanja Bokulić dum la milito kaj la kruela sieĝo de Sarajevo sukcesis sendi helpon al siaj Sarajevaj E-geamikoj. Nun ŝi invitis junajn esperantistojn el Sarajevo somerumi en 1997 en Rijeka kiel gastoj de tieaj esperantistoj.

*Esperanto-Ligo de
Bosnio kaj Hercegovino*

RADIO

Ĉerpu aŭskulturon

Horaro kaj frekvencoj de Ĉina Radio Internacia

11:00 - 11:30 Japanio, Koreio 7170, 9570

13:00 - 13:30 Sudorienta Azio 11600, 11840

20:00 - 20:30 Eŭropo 7405, 9965

22:30 - 23:00 Latin-Ameriko 9860, 6950

Ĉiuj horoj en UTC (Universala Tempo). Raportu al Ĉina Radio Internacia, CN-100866 BEIJING, Ĉinio; ☎+86/10/851-31-75 aŭ 851-14-28.

Itala Radio satellite

Post preskaŭ dujara atendo eblas finfine ĝui perfektan persatelitan aŭdkvaliton por RAI Internacia en Eŭropo. Ĉiusabate, ekde 20:00 ĝis 20:20 UTC (t.e. de 21:00 laŭ Meza Eŭropa Tempo), aldone al la du kurtondoj (9670, 11905 kHz), kaptu per: Eutelsat 13 E (Hot Bird 1), 11.446 MHz Vpol, 7,56 MHz. Bonvolu nepre raportu al la stacio: RAI Internacia – Esperanto, C.P. 320 Centro Corr., IT-00100 ROMA, ☎+39/6/33-17-18-95.

Skribu al Budapeŝto

Dum la ĵus pasintaj monatoj, la demando pri renkonduko de Esperanto (ĉi-foje per la internacia stacio) estis pridiskutata ĉe Hungara Radio. Ŝajnas ke ekzistas bona ŝanco je tio. Hungara Radio havas plurajn kurtondojn tre bone kaptatajn kaj, en Eŭropo, elsendas ankaŭ persatelite. En Budapeŝto ne mankas kapablaj homoj por produkti bonajn elsendojn al eksterlando. Se vi emas kuraĝigi la aferon, skribu al: s-ro Antal Réger, Direktoro de la Eksterlandaj Elsendoj, Radio Budapest, Bródy Sándor u. 5-7., HU-1800 Budapest, Hungario; ☎+36/1/138-73-39; ☎138-88-38.

Precipe se via lingvo estas inter tiuj jam uzataj de la eksterlanda servo de Hungara Radio, skribu nacilingve (hungare, germane, angle, ruse, ukraine, kroate, rumane, slovake, serbe). Indas ankaŭ skribi al la vialanda ambasadoro de Hungario, kun peto ke li transsendu la mesaĝon al la stacio.

*Amikaro de Esperanto en Radio
(AERA)*

Replike pri Bulgara Esperanto-Teatro

Unu aserto en nia teatra dosiero decembra konsternis aktorinon Belka Beleva.

La revuo *Esperanto* (dec., p. 204-207) proponis al ni valoran konkludon pri la centjara ekzistado de teatro en Esperanto: valoran, ĉar per ĝi ni aŭdis la sperton de aŭtoritatuloj jam multjare okupiĝantaj pri la problemoj kaj estontaj tendencoj de la E-teatro. Ili tuŝas demandojn kiuj rilatas kaj la dramverkadon en Esperanto kaj la signifon de la aktoro-esperantisto, kiu vivigas la skribitan tekston sur la scenejo.

Pro tio mi dankas al mia estimata koleginino kaj amikino, d-rino Marjorie

sencon, la nunan pozicion de Esperanto. Per interparoloj (en- kaj eksterlande), per raportoj lige kun nia organiza agado, per nia arto mem, ni multfoje pruvis tion. Jes ja, en nia repertuaro ni havas E-dramverkojn: de Emilija Lapenna, de Raymond Schwartz, de Giorgio Silfer, de Julian Modest mem — la unuaktaĵon *Ni vivos!*, dokumentan dramon kiun la aktoroj de BET eĉ registris sur disko.

Vere, ankaŭ tradukitajn teatraĵojn ni prezentas. Laŭ kiu alia maniero la esperantistaro povus ekkoni niajn bul-

pondi? —, ili sennombras: en naciaj kongresoj de BEA ekde 1958 ĝis 1996, en festoprogramoj, en programeroj dediĉitaj al E-poetoj kaj prozistoj... dekoj kaj dekoj en la tuta lando, plenumitaj de la samaj personoj kiuj laŭ Modest “ne komprenis la idealojn de la esperantistoj”.

(Mi opinias ke s-ro Modest konsideras alian trupon, formitan de Kiril Draĵev en 1970, sed mi ne permesas al li intermiksi tiun kun nia BET, “kiu havis multjaran historion kaj estis bone konata.”)

Kaj laste: BET aktoras en sia patrolando sen honorarioj, aŭ uzas tiajn nur por sia administra kaj arta agado. Ofte ĝi pagis mem siajn eksterlandajn vojaĝkostojn, aŭ estis subtenata de Bulgara Esperanto-Asocio.

En la venonta jaro BET — mi volus kredi — atingos sian 40-an datrevenon. Mi certas ke nia E-spektantaro denove ĉirkaŭbrakos nin per varmaj manoj por esprimi sian admiron al la ununura Esperanto-teatro konsistanta el profesiaj aktoroj, sindonaj esperantistoj, multjaraj adorantoj de la E-scenejo.

Vi, dramverkistoj, donacu al BET viajn originalajn verkojn altkvalitajn. Dankon!

Mi estos fiera ĉeesti tiun jubilean spektaklon, por travivi la emocion kiu plenigis mian koron antaŭ 40 jaroj — koron de aktoro, de esperantisto kaj ne koron de pagato!

Belka Beleva

*Bulgara Esperanto-Teatro
Honora Membro de UEA*



BET-anoj en 1979: sidas (de maldekstre) Veselin Damjanov, Belka Beleva, Stefka Prohaskova kaj Anani Anev; staras Prodan Prodanov.

Foto: Boris Anev

Boulton, al s-roj Lagrange kaj Golden, al mia samlandano, multjara kunaganto s-ro Julian Modest... al kies malveraj paroloj (p. 207) mi sentas min devigita respondi — jes, pro la memoro de miaj forpasintaj kolegoj, fondintoj de Bulgara E-Teatro (BET) en 1958, pro estimo al miaj nunaj junaj kolegoj ekde 1984, pro danko kaj amo al mia multjara partnero, mia edzo Anani Anev.

Ni, anoj de BET, antaŭ ol aperi sur scenejo, studis Esperanton en kursoj kun la instruistoj Mihail Langov, Kiril Draĵev, Kunĉo Valev. Ĉiu el ni regas la lingvon je diversa nivelo, neniuj eldiras la tekston “kiel papagoj”!

Neniam (dum tiuj ĉi 38 jaroj) iu ajn fariĝis ano de BET “laŭ politikaj kriterioj”!!! Ni estis, ni estas esperantistoj: regulaj membroj de Bulgara E-Asocio, konantaj la historion, la

garajn klasikulojn Vazov, Jovkov, Elin Pelin? Ĉu “primoko” estas prezenti mondajn klasikaĵojn en E-traduko de W. Auld, de C. Minnaja, de K. Draĵev, de K. Valev?!

Se temas pri prezentoj en Bulgario — ĉu al simila punkto eĉ necesas res-

ILEI alvokas multoble

La sekretario de ILEI, Marija Beloŝević (Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ☎+385/1/576-092; ✉Marija.Belosevic@public.srce.hr), petas ke kontaktu ŝin

– E-instruantoj trapasintaj la internacian pedagogian ekzamenon de ILEI, por ekscii kiel ili hodiaŭ utiligas la akiritajn sciojn;

– ILEI-anoj kaj E-instruantoj rete atingeblaj, por kompilota ILEI-retadresaro;

– tiuj kiuj povas sendi kopion, E-lingvan resumon aŭ bibliografiajn detalojn pri mencioj de Esperanto, planlingvoj, Zamenhof kaj homaranismo en lernolibroj de diversaj landoj.

Fortho kaj Esperanto — paralelaj mondoj?

Fortho estas komputila programlingvo. La aŭtoro de ĉi tiu artikolo lernis ĝin en 1985, kiam li aĝis 16 jarojn, kaj Esperanton en 1988. Li volas komuniki al vi sian miron pro la multaj koincidoj inter la du mondoj.

Historio

La programlingvon *Forth* (Esperante: *Fortho*) kreis la usonano Charles Moore en la 60-aj jaroj. Tiam li estis juna programisto en la Nacia Radio-Astronomia Observejo. Li regis plurajn programlingvojn, sed malkontentis pri ilia efiko, precipe por kontrolo de aŭtomataj sistemoj.

Li neniam celis krei kompletan lingvon, sed nur iom post iom solvi la problemojn laŭ li nesolvitajn de la aliaj lingvoj kaj ties labormetodoj: malfacilon, malrapidon kaj neflekseblon.

Post plurjara kaj soleca laborado, ĉ. 1969 li komencis profesie uzi sian proponon. Aliaj astronomiejoj usonaj baldaŭ interesiĝis, adoptis la lingvon — kaj la afero spontane ekdisvastiĝis.

Dekomence Moore volis resti simpla uzanto, por ke la lingvo evoluu nature, uzate de aliaj. Laŭ mia scio, tio estas unika: programlingvojn oni ĉiam kreas kaj proponas konkretaj kaj definitivaj.


Kurioze, la vera nomo de la lingvo estis *Fourth* (angle: kvara), ĉar la aŭtoro celis programlingvon por la kvara komputilgeneracio (1970-83). Tamen, lia komputilo ne ebligis tiom longajn dosiernomojn, do li uzis la samsonan *Forth* (angle: antaŭen), kiu prokute ĝis definitiva.

Moore kaj aliaj fondis en 1973 la entreprenon *Forth Inc.* por subteni kaj disvastigi la lingvon kaj verki *Forth*-programojn. Pro la kreskanta uzantaro, en 1978 naskiĝis en Kalifornio la asocio *Forth Interest Group* (FIG), la plej grava en la *Forth*-movado.

Ĉar efika, malmultekosta kaj facila, *Fortho* disvastiĝis rapide inter komputilemuloj. Tamen, meze de la 80-aj jaroj personaj komputiloj rapide plipotenciĝis. La lingvo ne lerte adaptiĝis al la nova situacio, kaj ĝia populareco malkreskis. Lastatempe tamen *Fortho* ekspertas revigliĝon, kiel ni vidos en la fino.

Programlingvoj ĝenerale

Komputilo ne komprenas komputil-lingvojn. Ĝia procesoro komprenas nur elektrajn signalojn en sia memoro, t.e. maŝinkodon. Eblas programi komputilon senpere en maŝinkodo aŭ prefere uzante mnemonikan lingvokodon nomatan asemblo. Asemblo estas do post maŝinkodo la plej malalt-nivela programlingvo — des pli alt-nivela ju pli simila al homa lingvo; ju pli malalt-nivela, des pli potenca sed malfacila.



Charles Moore, kreinto de Fortho

Ĉiam necesas transformi programlingvon en maŝinkodon. Analoge al homaj lingvoj, eblas du vojoj: interpretado kaj tradukado. Tion faras respektive interpretiloj kaj tradukiloj.

Interpretilo analizas, tradukas kaj funkciigas laŭvice ĉiun unuopan programinstrukcion. Avantaĝo estas tujeco: oni tajpas instrukcion kaj tuj vidas rezulton. Tio faciligas programadon. Malavantaĝe, interpretataj programoj malrapidigas kaj ne povas sendependi de sia interpretilo.

Tradukilo unue analizas kaj tradukas la tutan programon kaj poste disponigas la rezulton por sendependa funkciigo. Avantaĝo estas ke tradukita programo funkcias ege pli rapide. Malavantaĝe, ŝanĝoj kaj korektoj ĉiam postulas almenaŭ partan retradukadon, kio malrapidigas programadon.

Fortho, lingve

Dum aliaj lingvoj estas plenaj de gramatikaj reguloj kaj esceptoj, kun multaj plursignifaj simboloj, la *Fortho*-gramatiko estas plej simpla: nura interpunkcio en linio estas spaceto. Ĉio cetera estas "vortoj". Vorto en *Fortho* povas esti ĉia senspaceta signoĉeno: *mia_kalkulo* aŭ 1997 aŭ *tri=3* aŭ *;-D* aŭ *Ajn!*. La sistemo havas vortaron, t.e. liston de vortoj kun difinoj. La difino diras kion la vorto faru kiam vokita. En tiu vortaro programisto povas ŝanĝi, forigi, reverki aŭ aldoni senlime kion ajn por krei programon aŭ propran *Fortho*-sistemon.

Fortho-sistemo estas mirinde simpla: ĝi atendas vorton (tajpitan per klavaro aŭ legitan el dosiero), poste serĉas ĝin en sia vortaro, fine agas laŭ la vortdifino — kaj ree senfine. Se vorto ne estas trovita en la vortaro, *Fortho* unue provas ĉu ĝi estas nombro. Se jes, ĝi metas ĝin en portempan memorzonon nomatan stako; se ne, ĝi haltas kaj montras la erarmesaĝon "netrovita vorto", ĉar ĝi povas nenion plu fari.

Ni vidu ekzemple, kiel oni petas de *Fortho* sumigi la nombrojn 34 kaj 7: $34\ 7\ +$.

La klarigo estas simpla: 34 unue kaj 7 poste, ambaŭ iras sur la stakon, ĉar *Fortho* ne trovas ilin en sia vortaro, sed rekonas ilin nombroj. Poste venas la vorto $+$ (plus), kiu enestas en la vortaro: laŭ sia difino, ĝi devas preni la du suprajn nombrojn el la stako, adicii ilin kaj meti la sumon sur la stakon; fine venas la vorto $.$ (jes, punkto!), kiu laŭdifine prenas la supran nombron el la stako kaj printas ĝin surekrane. Se 34 aŭ 7 estus nomoj de vortoj kreitaj de programisto, *Fortho* rekonas kaj funkciigus ilin.

Ni kreu nun novan vorton por kalkuli sendokoston de libro (kiu estu, ekz., 10 procentoj sed minimume 5 guldenoj), adicii ĝin al la libroprezo kaj printi la sumon:

$+sendokosto\ dup\ 100 / 10 * 5\ max$
 $+ . ;$

La vorto $:$ (dupunkto) ŝanĝas *Forthon* en tradukadon, kaj ankaŭ prenas la postan signoĉenon ($+sendokosto$) kiel nomon por la nova vorto. Tradukado signifas ne funkciigi la venontajn vortojn, sed konservi ilin kiel difinon de la

krea vorto. La postaj 9 vortoj de *dup* ĝis . estas la vortdifino de *+sendokosto*, t.e. la vortoj aŭ nombroj kiuj funkcias kiam ni vokos poste la novan vorton *+sendokosto*. Fine la vorto ; (punkto-komo) reŝanĝas la sistemon en interpretadon. Ekde nun, la vorto *+sendokosto* estas en la vortaro kaj je nia dispono. Tajpinte 100 *+sendokosto* ni vidas 110 surekrane. Ĉiuj vortoj havas en la sistemo saman gravecon (eĉ saman kiel tiuj verkitaj de la Fortho-aŭtoro) kaj funkcias preskaŭ je maŝinkoda rapido.

kialo estas la movado: apenaŭ eblas profiti la lingvon izolite, pro manko de merkata populareco. Dua kialo estas la lingva demokratio: ĉiu rajtas proponi alternativojn al kiu ajn ero aŭ eco de la lingvo, kaj, se ĝi estas bona, ĝi estos spontane uzata de aliaj. La lingvo mem ebligas tion kaj la Forth-komunumo invitas al tio. Eble jen la vera kialo ke Fortho transvivis kaj evoluis sen ekstera helpo: En la Forth-mondo, ĉiam eblas al ordinara lingvouzanto grave kontribui al la lingvo. Sed tiu ĉi eksterordinara eco

facile atingi senpagajn Forth-sistemojn por preskaŭ ĉia komputilo.

FIG (<http://www.taygeta.com/fig.html>) aktivadas, eldonas dumonatan bultenon, tenas libroservon, kunordigas lokajn asociojn, organizas renkontigojn ktp. Plu aperas novaj libroj kaj Forth-sistemoj. Bedaŭrinde, inter 1988 kaj 1995 la tutmonda FIG-anaro faladis de 4 000 ĝis 2 000.

Evidentas ke Fortho ne iĝos pli populara facile. Tamen ne eblas timi ĝian morton, ĉar ĝiaj ecoj estas eksterordinaraj. Ĝi plu estos lingvo por postulema kaj idealisma minoritato.

Lastatempe aperas esperigaj signoj: Post plurjara debatado kaj strebado de la Forth-movado, naskiĝis nova normo, ANS Forth, celanta ebligi al novaj Forth-programoj funkcii preskaŭ senŝanĝe en ĉiaj plej modernaj komputiloj kaj mastrumaj sistemoj. Fortho estas pli kaj pli uzata por gravaj projektoj (kiel programo en la usona spacveturilo *Challenger*). Aperas novaj Forth-sistemoj, tre potencaj kaj senpagaj (ekz. por Vindozo '95).

Dume Charles Moore, ĉiam skeptika pri ajna normigo, iras sian vojon kiel ordinara Forth-programisto, disfoje partoprenante en la movado. En sia propra entrepreno *Computer Cowboys* (komputilaj vakeroj), li nun dezajnas potencegajn procesorojn — kompreneble sub sia ĉiama devizo: “Tenu ĝin simpla!”.

Marcos Cruz (Hispanio)

✉ mcm@arrakis.es

Iuj komputilistoj diras ke Fortho estas nelegebla kaĉo. Vere, ĝi ne celas unuavidan kompreneblon sen antaŭstudo, sed facilan lernadon kaj bonan regadon. Tial ĝi havas intuan, flekseblan kaj senesceptan strukturon.

Fortho faciligas postan lernadon de aliaj lingvoj, ĉar ĝi instruas ĝeneralajn konceptojn, ne rekte atingeblajn alilingve. Krome, ĉar ĝi ebligas senlimajn kreivon kaj liberecon, ĝi estas lertamplifilo: ĉe bona programisto, Fortho ebligas bonegajn verkojn; ĉe malbona — monstraĵojn.

Internaj ideoj

Fortho baziĝas sur la ideo teni ĉion simpla. Simpleco ne nepre signifas primitivecon. Male, por Moore simpleco signifas efikecon kaj do produktivon. Jen liaj propraj vortoj el prelego okaze de la dekjarigo de Fortho: “Mi celis nur esti pli produktiva programisto. Antaŭ ol la afero komenciĝis, mi kredis ke en 40 jaroj mi povos verki 40 programojn (...) Mi pensas ke mi deokobligis tiun kvanton, kaj ke ĝi ne plu dependas de programlingvo, do mi atingis mian celon.”

Fortho elvokas ekstremajn sintenojn: unuj amas, aliaj malamas ĝin. Laŭ vortoj de Moore: “Se oni volas ekigi diskuton ĉe komputilistoj, simple diru: ‘Fortho estas bonega lingvo, ĉu ne?’”

Uzantoj de aliaj programlingvoj ne sentas sin apartenantaj al lingvokomunumo, dum Forth-uzantoj ja sentas sin anoj de la Forth-komunumo. Unua

estas ankaŭ malfortaĵo: multaj Forth-hobiuloj dediĉas sin al “pliboniga” reverkado de Fortho anstataŭ bona verkado en Fortho...

Nuno kaj futuro de Fortho

Ne estas facile trovi librojn pri Fortho. Demandite, librovendistoj respondas: “Iam estis pri tio, sed neniu plu petas”; aŭ eĉ: “*Furz?* Kio estas tio?”.

Komputikaj entreprenoj uzas precipe la lingvon C, pri kiu troveblas abundo en la merkato. Nur malmultaj entreprenoj uzas Forthon, precipe pri robotiko kaj aŭtomatigo, ofte ĉar responsulo estas Forth-aktivulo kaj konas la avantaĝojn.

Por la malmultaj programemuloj kiuj aŭdis pri ĝi (sed plej ofte neniam eklernis ĝin) Fortho estas kuriozaĵo kiun eblas simpatieti, sed neutila ĉar neuzata. Kurioze, en la reto estas plej

Informkampanjo pri Eurokka-disko

Pasintan someron aperis kiel kompakta disko kaj kasedo *Volumo 2 de Vinilkosmo-kompil'*, kolekto de tre diversaj muzikpecoj el tre diversaj landoj, en Esperanto. TEJO kaj la produktanto Eurokka (Esperanto-Rok-Asocio) ricevis subvencion de Eŭropa Junulara Fondaĵo por la produktado kaj por diskonigo en ekster-Esperantujo. Por ĉi lasta celo TEJO nun serĉas kunlaborantojn ĉie en Eŭropo kaj ekster ĝi, kiuj leteru al radiostacioj kaj muzikrevuoj en sia lando kun informoj pri la kompilaĵo, proponante senpagan ekzempleron disponigotan de TEJO.

Anoncu vin ĉe la kunordiganto: Jeroen Balkenende, ĝenerala sekretario de TEJO, p/a Draŝnárová, Slavičková 21, CZ-16000 Praha 6, Ĉeĥio; ☎+42 (de la 1-a de marto +420)/2/803-608; jeroen@lorentz.leidenuniv.nl.

Profesoro pri interlingvistiko serĉata

La Estraro de la nederlanda "Stichting Esperanto bij het Onderwijs" (Fondaĵo Esperanto ĉe la Instruado) invitas aspirantojn kandidati por la posteno de **eksterordinara universitata profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto**, ligita al la Fakgrupo de Ĝenerala Lingvoscienco ĉe la Filologia Fakultato de la Amsterdama Universitato.

La profesoro laboros sur la kampo de interlingvistiko, tiu interfaka lingvosciencia tereno en kiu la internacia komunikado estas diversflanke pristudata, kaj aparte atentos la teorion kaj praktikon de artefaritaj, help- kaj planlingvoj, precipe Esperanto.

La taskoj inkluzivos: la esploradon de planlingvoj aŭ artefaritaj lingvoj, precipe Esperanto, de iliaj lingva

strukturo kaj signifo por la internacia komunikado.

La profesoro planu, plenumu kaj gvidu sciencajn esplorojn; konsilu al publikaj institucioj pri tio kio estas farebla kaj farinda kampe de la fako; partoprenu en sociaj diskutoj kiuj koncernas la temon de la katedro; lekcii pri la katedra temo, kaj gvidu universitatajn Esperanto-kursojn.

Atendataj kapabloj: la kandidato – estu montrinta, en sia doktoriĝa tezo kaj ceteraj publikigaĵoj, grandajn sperton kaj kompetenton en la kampo de interlingvistiko;

– havu sperton kaj pruvitan kapablon pri instruado al diversaj celgrupoj; – posedu bonajn kapablojn de konfaktado kaj gvidado.

Komence temas pri enoficigo por 2/10 (du dekonoj) de plena posteno por tri jaroj. Salajro laŭ interkonsento. Pliaj informoj haveblas ĉe s-ino C.J. de Jonge, Oficejo de la Filologia Fakultato de la Amsterdama Universitato; ☎ +31/(0)20/525-30-66.

Kandidatiĝaj leteroj estu forsenditaj, antaŭ la 15-a de marto, al:

Faculteitsbureau Letteren, Spuistraat 210, NL-1012 VT Amsterdam, t.a.v. het Curatorium Leerstoel Interlinguïstiek.

La Kuratoraro konsistas el: mag. J.H. Erasmus (prezidanto), s-ino C.J. de Jonge (sekretario) kaj prof. d-ro P.C. Muysken. La Kuratoraro tre aprezos ricevi valorajn sugestojn pri oportuna kandidato. ★

La kimero de plena posedo

Ne tro imponas al mi la enhavo de la nun fi-fama "Manifesto de Prago". Mi ne intencas tie ĉi meti la tutan dokumenton sub la lenson de la intelekta mikroskopo sed limigos min al kritiko de unu el la eroj.

En Sekcio 3, titolita "Pedagogia efikeco", estas aserto kiun mi opinias troiga, blufa, efektive falsa: "Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado." Ĉu okazis krak' en la kapo de Mark Fettes, kiam li surpaperigis tiun frazon? Kie estas la fake apogeblaj atestaĵoj kiuj pravigas la supozon ke iu ajn en Esperantujo povas *plene* posedi la lingvon? Sobra observo kaj analizo de la lingvouzo de esperantistoj en la pasinteco kaj ankaŭ nuntempe igas senenhava la esprimon "plena posedo", ĉar neniuj, eĉ Fettes mem, kapablas objekte ekspliki ĝian signifon kaj montri kiel estas eble mezuri ĝin. La eldiro de Fettes en la kadro

de dokumento nomata "manifesto" odoras je demagogia priskribo de kimera situacio.

"Malplena posedo" de ordinaraj esperantistoj

Humphrey Tonkin, antaŭa prezidanto de UEA, en alparolado ĉe jar-kongreso de la landa asocio en Usono, akcentis ke "la parolantoj de Esperanto... ofte tre neperfekte kaj neadekvate parolas ĝin", kaj ke ja necesas ke ili "plie enprofundiĝu en la lingvon" (*Esperanto*, feb. '94, p. 22). Kiel akordigi tiun negative kritikan vidpunkton kun la facilanima opiniesprimo de Fettes?

Lingvoposedo de la elito en Esperantujo

Ĉu eble la t.n. bonaj aŭtoroj plene posedas la lingvon? Tuuu-te ne! En recenzoj de iliaj libroj oni ricevas malbonan impreson pri ilia lingvo-

kapablo, ĉar aglo-okulaj recenzantoj ne hezitas atentigi kiam lingvaj malĝustaĵoj makulas la paĝojn. Ĉi-rilate, neadekvata estas ankaŭ la lingvoscio de esperantistoj okupiĝantaj pri publikigo de libroj kaj periodaĵoj, ĉar ili ne ĉiam sukcesas faksperite revizii kaj korekti eldonotajn verkojn. Kiom da homoj kiuj arogas al si instrui Esperanton estas kompetentaj posedantoj de plena lingvoscio? Ĉu eble la solaj esperantistoj kiuj rajtas pretendi pri plena posedo de la lingvo estas membroj de la Akademio de Esperanto? Mi opinias ke ne, ĉar mi jam registris plej diversspecajn lingvajn erarojn el la plumoj de akademianoj.

Konkludo

Se aŭtoroj de libroj, lingvo-instruantoj kaj akademianoj ne povas demonstri ke estas eble atingi plenan posedon de Esperanto, estos tre malfacile konvinki skeptikajn politikistojn kaj lingvofakulojn ke estas eble primajstri Esperanton, ĉu per memstudado ĉu per iu ajn alia lingvolerna metodo.

Bezonata estas ne vortlaksa verkado de papersvarmo da nenidiraj manifestoj, blufŝvelaj deklarioj kaj naivaj rezolucioj, sed pli rigore disciplinita rezonado pri la lingva situacio vere ekzistanta en Esperantujo.


For la troigojn! For la falsadon!

Bernard Golden (Hungario)

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Recenzoj



Centoj da ĉinaj temoj

Ĉina ceramiko. Zhao Hongsheng. El la ĉina trad. Wang Chongfang. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1994. 223+15p. 19cm. Fotoj. 12,00 gld.

Enciklopedieto de Ĉinio. Komp. Li Qiang, Zhang Meizhi. El la ĉina trad. Fan Yizhu. Pekino: ĈEE, 1994. 305+15p. 20cm. Fotoj. 19,50 gld.

En la memoro de ni olduloj restas libro eleganta, *Enciklopedieto japana*, kiu, antaŭ multegaj jaroj, prezentis la mondon de japanaj folkloro kaj tradicioj elegante al ne-japanoj, samtempe proponante diversajn utilajn neologismojn. Nun sekvas simile utila kaj interesa libro pri Ĉinio. Celante ne-ĉinojn, ĝi proponas priskribi — mallonge tamen utile — tutan gamon de preskaŭ cent temoj: de tradiciaj kalendaroj al la evoluo de ĉina mono, de sigelila gravurado al klasikaj ĝardenoj, famaj montopintoj, lagoj kaj akvofaloj, de la hejmurbo de Konfuceo al la naciaj flago kaj himno. Ĝenerale la enhavo rilatas al ĉinaj folkloro, historio, geografio kaj kutimoj.



La pitoreska Huangshan-monto de Anhui-provinco (el *Enciklopedieto de Ĉinio*)

Libro pri Ĉinio ne povas eviti ĉinajn nomojn kaj terminojn. *Enciklopedieto* saĝe sekvas la internacie norman sistemon Hanyu Pinyin por literumi nomojn de lokoj, epokoj kaj personoj. Kiam ne temas pri absoluta neceso, la libro emas eviti neologismojn. Ekzemple, la redaktoroj preferas la kunmetaĵon *manĝbastonetoj* (p. 262) malgraŭ pli frua uzo de *kuaizio* en la ĉina gazetaro. Kelkajn neologismojn interesajn (plejparte jam sufiĉe internaciajn) oni ja trovas, kiel (p. 280) *uŝuo* (ĉine: *wūshù*, la aro de ĉinaj "militaj artoj") kaj (p. 282) *ĉigongo* (ĉine: *qīgōng*, la medicina ekzerca sistemo).

Per *Ĉina ceramiko* ni lernas pri la argilaĵoj sufiĉe simplaj de plej antikva Ĉinio kaj pri la mirindaj figuroj de militistoj kaj ĉevaloj de la tombo de Qin Shi Huangdi. Pli ol mil jarojn a.K. aperis la glazuritaj argilaĵoj konataj sub la nomo "fajenco". Per pli bona argilo kaj iom pli alta temperaturo oni sukcesis produkti porcelanon en la unuaj jarcentoj p.K. Sekvis longa historio de estetika konkurenco inter diversaj bakuloj. Ni informiĝas ankaŭ pri la komerco eksterlanda en ĉina porcelano, kaj la libro finiĝas per ĉapitro pri industriaj ceramikaĵoj. La kvalito de la lingvo estas tre bona, kaj la enhavo konstante interesa.

David K. Jordan (Usono)

Propagando kun ŝaŭmo

Germanaj biero kaj bierkulturo. Sciindaĵoj pri valora trinkaĵo. Harald Schicke. Buchholz: MZ-Verlag, 1995. 130p. 21cm. Ilus. 21,00 gld.

Mi devas konfesi ke ĉi tiu libro sufiĉe desapontis min, avidan bieremulon. Krom kelkaj interesaj paĝoj pri la historio de biero kaj pri la nuntempa bierfarado, mi trovis en ĝi malmulte da informoj. La aŭtoro dediĉis nur ok paĝojn al la specoj de germanaj bieroj; riproĉinde se oni konstatas ke ekzistas pli ol 5000 diversaj. Tio devintus esti la kerno de la verko: indikoj kiun bieron indas provi en iu aŭ alia regiono de Germanio.

Bedaŭrinde, la verko anstataŭe multe okupiĝas pri "bierkulturo". La priskriboj kial, kiel kaj kie oni trinkas bieron ŝajnas direktataj al aliplane-danoj. Estas nekredinde ke homo kun aliro al televido kaj libroj en iu ajn parto de la mondo ne povus imagi

trinkejon, bierĝardenon ktp. Ĝis endormigo la aŭtoro tamburas cent- aŭ plifoj pri la germana pribiera leĝo "Reinheitsgebot". Jes ja, tiu leĝo postulas ke ĉiu germana biero estu "pura", farita ekskluzive el lupoloj, malto, gisto kaj akvo. Unuflanke bone, ĉar ĝi malpermesas kemiajn aldonadojn. Aliflanke malbone, ĉar lando kiu kliniĝas al tiu postulo ne povas produkti la elstare trinkindan belgan "Lambic"-bieron kun aldonita fruktosuko, nek la bonegan dolĉan porteron de Britio. Ankaŭ alimaniere la aŭtoro montras ian netoleremon al la diverseco de biermoroj. Por li, biero sen ŝaŭmo estas nepre "naŭza, vomiga". Tamen, anglaj kultantoj de la tradiciaj eloj preferas trinki ilin sen ŝaŭmo.

Mi trovis neakcepteblaj la asertojn de la aŭtoro pri la efikoj de biero sur la sanon. Laŭ li biero ne dikigas. Biero ja enhavas iujn valorajn nutraĵojn, kiel ekz. B-vitaminaĵojn, sed ankaŭ po kelkcent kaloriojn litre, kaj ĉar ĝi ne satigas la apetiton, ĝi facile trinkeblas aldone al kalori-riĉaj manĝoj. Se oni tro bierumas, oni dikiĝas kaj evoluigas bierventron. En modera kvanto, jes ja, biero povas esti saniga — sed same ankaŭ ruĝa vino.

Entute do, la libro ŝajnas plie traduko de propagandilo el la germana bierindustrio ol vera informlibro por biersatantoj. Ĉe venonta eldono la aŭtoro pli atentu doni informojn kiuj helpas la leganton sperti kaj ĝui la tutan gamon da germanaj bieroj ol nure propagandi. Ĝis tiam mi revenos al mia anglalingva gvidlibro por informiĝi kien mi iru en Germanio por trovi la plej bonajn bierojn.

Krys Ungar (Britio)

Sorĉ-skatolaj enhavo

Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh. Red. Katalin Smidélus. Sabatejo [Szombathely]: la redaktinto, 1995. 128p. 23cm. 22,50 gld.

Andreo Cseh — la *gaja stelo* kiel "edzperanto". Historio de romantika amo. Red. Ada Csiszár. Budapeŝto: la redaktinto, 1996. 56p. 21 cm. Ilus. 7,50 gld.

Validaj biografioj (se escepti pri Zamenhof mem) apartenas al la historiografiaj raraĵoj de Esperanto. Tiom pli ni bezonas la provizoron de hagiografiaj kaj aliaj prolegomenoj. Interesaj figuroj ne mankas niamovade. Inter ili sendube troviĝas la Rumani-devena katolika pastro kaj pedagogo Andreo Cseh (1895-1979), kies rekt-metoda instruado, la Ĉemetodo, furoris grandstile precipe dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj. Gyula Baghy kaj Lidja Zamenhof estis inter ĝiaj plej fervoraj praktikantoj.

Por la centenario de Cseh, samtempe sed sendepende, aperis du ĉarmaj dokumentoj kompilitaj kun amo kaj admiro de du hungarinoj: Katalin Smidélus kaj Ada Csiszár. Ambaŭ rivelas al ni la enhavon de sorĉ-skatoloj. En sia klopodo teni viva la memoron pri Cseh, Smidélus trovis en Hago skatolon kun personaj suveniroj de Cseh (i.a. la korespondo kun la gepatroj): ili formas la leonan parton de ŝia libro,



Veronika Eksta (1902-1991), Esperanta belreĝino en 1929 (el Andreo Cseh...)

kiun kompletigas fotoj, faksimiloj kaj rememoroj de samtempuloj. Per ĉi aŭtentaj dokumentoj restariĝas viva, multfaceta bildo de la "migranta lingva apostol" (Kalocsay).

Ada Csiszár, de sia flanko, malkaŝas al ni kurt-tempan (1929-1931) korespondon inter Cseh kaj Pál Tolnai (1891-1971). Ili amikiĝis dum la preparoj por la 21-a Universala Kongreso (Budapeŝto, 1929), kiam Tolnai enamiĝis al la tiujara Miss Esperanto, la estonino Veronika Eksta (1902-1991). La korespondo rivelas al ni romantikan amon, en kiu Cseh rolas kiel edz-peranto. Sed ne okazis la nupto inter la katolika estonino kaj la juda hungaro, kvankam Cseh desŝtonis la vojon kaj provis forigi barojn. Li montriĝas en ĉi leteroj firma filo de sia eklezio, sed samtempe avangarda, progresema kaj malmiopa. Nu, la knabino estona restis dumviva fraŭlino, Tolnai edziĝis, sinsekve, al du fratinoj. La korespondojn kun Cseh li gardis dumvive, kaj lia vidvino konfidis ilin al Ada Csiszár.

Belaj kaj kortuŝaj dokumentoj pri postkulisaj diskretoj. Espereble ilin baldaŭ sekvos la detala biografio de Andreo Cseh.

Reinhard Haupenthal (Germanio)

GLOSOJ

centenario = centjara datreveno

desŝtoni = senŝtonigi

la leona parto = la plej granda parto

suveniro = memoraĵo

**Foli-
ume**



• Okcitana premiero

Sub la duobla devizo "Amikeco kun la esperantistoj — Amikeco kun la okcitanoj", aperis en decembro la unua numero de *EsperantOC*, ne-regula bulteno en Esperanto kaj en la okcitana, lingvo parolata en la suda duono de Francio. Redaktas ĝin Daniel Pfeiffer (Münsterer Str. 5, DE-60326 Frankfurt; Daniel.Pfeiffer@

Informatik.START.dbp.de). La bulteno (atingebla ankaŭ ĉe <http://www.lpl.univ-aix.fr/~stecoli/EsperantOC>) celas reciproke informadon de esperantistoj kaj okcitanoj, kaj instigi fondon de asocio — sen konkurenci Internacian Komitaton por Etnaj Liberecoj.

• Vortaro dank' al Esperanto

La unua dudirekta vortaro inter la eŭska kaj nederlanda lingvoj, ĵus aperinta, dankas sian ekeston parte al Esperanto: la aŭtoro Wim Jansen (estranaro de la asocio Esperanto Nederland) strikte kunlaboris kun la eŭska verkisto Aitor Arana (aŭtoro de la unua E-lernolibro por eŭskoj) por precize difini la sencojn de la 11 mil eŭskaj kapvortoj. Laŭ vortoj de Jansen en la revuo *FEN-X*, "sen la enŝalto de Esperanto kiel pontlingvo la verko ne povus aperi". Nome, Esperanto kapablas speguli la riĉan sufikso-sistemon de la aglutina eŭska

lingvo pli fidele ol la franca aŭ la hispana, la pontlingvoj kutime uzataj por peri la eŭskan. "Ĉiu unuopa vorto estis filtrita tra Esperanta kribrilo, [kaj ni] bezonis atenti nur pri la korekteco de la rilato inter la gepatra lingvo kaj la pontlingvo Esperanto."

• Kvardek-jariĝo sen kvardeka jarkolekto

La impona faka revuo *Hungara Fervojista Mondo* festas jubileon: fondita en 1957 de István Bácskai, Honora Membro de UEA (vd. nekrologon '96 mart., p. 60), ĝi aperas seninterrompe de 40 jaroj. En sia rememora ĉef-artikolo (96/4) redaktoro János Patay informas ke Bácskai mem verkis ne malpli ol 230 el la preskaŭ 2300 artikoloj aperintaj en *HFM*, kaj ke pro eraro la jarkolektoj 1982 kaj 1983 aperis ambaŭ kiel 26-a, kion kompensas ke la "malĝustan" 39-an jarkolekton 1996 sekvos en 1997 la "ĝusta" 41-a.

**SE VI NE SCIAS PRI IO,
NE KULPIGU ALIAJN!
→ Abonu al Eventoj!**

pk. 87. HU-1675 Budapest, Hungario

Plezuro je ĉiu paĝo

La infanoj en la arboj. Gudrun Pausewang. Kun ilustraĵoj de Inge Steineke. El la germana trad. Nora Caragea. Maribor: Inter-kulturo, 1995. 62p. 20cm. Bind. Gajninto de la premio "Infanlibro de la Jaro" de Belartaj Konkursoj 1996. 19,80 gld.

Gudrun Pausewang jam estas konata inter esperantistoj pro sia romano (1983) *La lastaj infanoj de Oldrovalo*, tradukita de Joachim Giessner. En tiu libro la aŭtorino bildigas la strebojn de ordinara familio, aparte la infanoj, travivi

ĥaoson post atoma eksplodo. En *La infanoj en la arboj* ŝi turnas sin al alia kriza situacio, la konservado de la Naturo. La familio Santana vivas rande de la praarbaro en Sud-Ameriko. Ili sukcesas vivteni sin per laboro sur siaj kampetoj. Kiam la bienposedanto decidas forbruligi la arbarojn por provizi sin per pli da kampoj, la tuta ekologia sistemo estas minacata. La infanoj Santana sukcesis haltigi la planon kaj influi la posedanton pensi pli favore al la medio — mesaĝo grava kaj aktuala, kiu prave direktiĝas al junaj legantoj. La klara, rekta traduko de Nora Caragea fluas glate. La stilo perfekte taŭgas al la rakonto kaj al la celata legantaro.

Plezure estas legi ĝin. Preskaŭ ĉiu paĝo enhavas kaj tekston kaj bildon, aranĝitajn tiel ke ĉiu malfermo de la libro prezentas tre kontentigan unuecon. Libro akirenda.

Harold Brown kaj
Kerstin Rohdin
(Svedio)



Lemi gramatike

Hungara lingvokurso. Maria Balendux-Bogyay. Al Esperanto adaptis Marc Vanden Bempt. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1990. 384 p. 21 cm. 46,80 gld.

Laŭ mia scio ne ekzistas lerniloj pri la tiel nomataj mondlingvoj por esperantlingvanoj; aliflanke aperis antaŭ sep jaroj lernolibro de la hungara. Esperanto ja estu pontolingvo ankaŭ en lingvolernado, laŭ la intenco de la adaptinto de la origine nederlandlingva verko.

La 15 lecionoj ebligas al persista lernanto penetri en la logikan labirinton de la hungara gramatiko, kaj eventuale malkaŝi la fontojn de hungarismoj en Esperanto. Ĉiu el ili dividiĝas en la partojn Teksto, Vortoj, Gramatiko kaj Ekzercoj, kaj entenas tekstojn kaj dialogojn pri ĉiutagaj scenoj. Pro la riĉa hungara morfologio superpezas la gramatika parto kun

ekzemploj, kaj ankaŭ la ekzercoj koncentriĝas al gramatikaĵoj, neglektante la vortprovizon. La nuntempe kutimaj ludoj, aktivigaj kaj komunikigaj taskoj komplete mankas. La kompakta volumo ambicie intencas trakti preskaŭ la tutan gramatikon.

Estis bona ideo resumi la bazajn diferencojn inter Esperanto kaj la hungara. Same eblas koncerne la similaĵojn — ĉefe la aglutinan karakteron de vortformado en ambaŭ lingvoj, kiun la verko poste traktas.

Temas do pri bone konstruita lernolibro tradicia, sen komunika aliro. La originalo aperis en 1986, post kio surmerkatiĝis pluraj modernaj lernolibroj de la hungara. Estas vero ke plene komunika metodo ne vere eblas por lingvoj kun komplika gramatiko, kiel la hungara, sed paralele al la gramatika kompetento ankaŭ la komunika kapablo devas esti evoluigata. La adaptinto faris bravan laboron.

Ilona Koutny (Pollando/Hungario)

Laste aperis

Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj. Gosciny. Desegnis Uderzo. El la franca trad. Jean-François Cousineau, Patrick Lagrange. Zagreb: Izvori, 1996. 48p. ISBN 953-6157-49-7. 29cm. La neobeigeblaj gaŭloj montras siajn sportajn kapablojn. Kvara kajero en la nova serio. 19,80 gld.

El la plumo de rumana reĝino. Carmen Sylva (1843-1916). El la rumana. Berkeley: Bero, 1996. 34p. ISBN 1-882251-12-1. 21cm. Prozaĵetoj de Elisabeta, reĝino de Rumanio, subteninta Esperanton, traduke aperintaj plejparte en frutempaj E-eldonadoj (1908-1911). 10,50 gld.

Peter Jameson's secret language. Sylvan Zaft. Anglalingva. Farmington: Bela Lingvo Press, 1996. 152p. ISBN 0-9652549-0-9. 22cm. Romano por dekelk-jaruloj: Peter Jameson kaj liaj amikoj malkovras por si Esperanton kaj tial konfrontiĝas kun lerneaj aŭtoritatoj. 18,00 gld.

Rakontoj prapratraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazemis aferoj mirindaj. Doko (ps. David K. Jordan, 1942). Berkeley: Bero, 1996. 71p. ISBN 1-882251-13-X. 22cm. Dek du rakontoj en folkloreca stilo, kiuj "prezentas Esperantujojn en la epoko de niaj ne-ekzistantaj prapatroj" (la aŭtoro). 10,80 gld.

Ruslanda esperantista jarlibreto 1996. Jekaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1996. 16p. 21cm. Informoj pri kaj membrolisto de Rusia E-ista Unio, kun utilaj sciindaĵoj pri la ruslanda movado. Rusaj nomoj aperas ciril-skribe. 3,60 gld.

Saluton! Esperanto aŭtodidakte (1983). Audrey Childs-Mee (1926-90). Roterdamo: UEA, 1996 (6-a eld.). 194+40p. ISBN 92-9017-050-6. 21cm. Ilus. Rektmetoda lernolibro por memlernantoj, sed taŭga ankaŭ por kursoj. Kun ŝlosilo por la ekzercoj kaj kun indeksoj. Ekzistas kasedo kun la dialogoj. 24,00 gld.

Verkoj. Du biletoj; La bona geedzeco; Sep fabloj. Jean Pierre Claris de Florian (1755-94). El la franca trad. resp. H.J. Bultuis, L. Touchebeuf (1907); J. kaj H. Gonin (1996); P. Stojan kaj E. Mallet (1923). Paris: UFE, 1996. 44p. 21cm. Du komedioj kaj sep fabloj de favorito de Voltero. 13,50 gld.

DIVERSAĴO

Kompakta disko: Esperanto. Madrid: Warner Music Spain, 1996. N-ro 0630-17124-2. Klasikaj muzikpecoj moderne adaptitaj kaj reverkitaj, kun Esperanta teksto. Korusan kantadon fonas sintezila sono. Kun 7-lingva tekstokajero. (Vd. dec., p. 209.) 37,80 gld.



Remi en sama boato bonas por la sano



Kiel vera esperantisto, ankaŭ mi pensas ke sole mi scias kiel sukcesigi Esperanton kaj kredas ke sufiĉos nur aperigo de mia opinio por ke ĉiu

kristale klare vidu mian veron kaj ekde nun agadu laŭ ĝi.

La temo kiun Ziko M. Sikosek ŝajne lanĉis ("For la Esperantan sektismon!", jul.-aŭg., p. 136), apartenas al la ĉiamaj ostoĵoj de nia movado. Kiam mi estis komencanta esperantisto antaŭ 15 jaroj, traktato de D. Blanke laŭ kiu la interna ideo ne ekzistas kaj Esperanto estas nur lingvo, vekis en mi grandan ĉagrenon, tiom pli ĉar por ilustriti ties veron Hungara Esperanto-Asocio senpage distribuadis ĝin en la hungara (!) lingvo, kaj konforme al ĝi dum tiel nomataj Esperanto-kongresoj regis la uzo de la hungara.

Ni rigardu kion Sikosek diras, krom superfluaĵoj insultoj ke ekzemple mi estas: naŭva, konkerema, sekteca, netolerema, malhelpanto de la progreso de Esperanto ktp.

Nu, Sikosek diras (almenaŭ akcepte citas) ke "la plimulto de esperantistoj ne estas tiom amikoj de instrumento por internacia komunikado kiom anoj

de 'interna ideo'". Tio al li aspektas kiel sektismo, kaj li proponas: "For la Esperantan sektismon!". Do li proponas handikapi la movadon — ĉar ja forigo de la sektismo signifus forigon de "la plimulto de esperantistoj".

Miroslav Malovec reagante (okt., p. 176) jam diras iom pli, ĉar li parolas ankaŭ pri la farendaĵoj: ĉiutage ni esperantigu montojn da diversaj tekstoj, por ke ĉiu trovu la aktualajn novaĵojn de sia fako en Esperanto; ni kreu grandajn vortarojn; ni uzu la eblojn de la tutmonda, komputila retkomunikado.

Kaptitaj de la "interna ideo"

Mi certas ke ambaŭ sinjoroj estas niaj fervoraj samideanoj, ĉar malgraŭ ke ili konscias kaj mem indikas la gravajn malavantaĝojn, ili pretas foruzi siajn energiojn kaj tempon por Esperanto. Laŭ mia vortumo, ili estas kaptitaj de la "neekzistanta interna ideo".

Kaj nun sekvas miaj mondsavaj ideoj, admonoj, konsiloj, proponoj. (Ne forgesu ke nur mi sole pravus — kvankam vi mise pensas ke nur vi havas la veron!)

Mi opinias ke la plejmulto de esperantistoj estas memstaraj individuoj, kiuj sen ajna perforto iras laŭ siaj propraj vojoj. Ĉar la utila uzo de Es-

peranto nuntempe limiĝas al tre malvastaj kampoj, ili memkompreneble devas havi ian idean impulson por ne foriĝi.

Mi ne povas imagi ke iu aktive agadu sur ajna kampo de la vivo sen persona utilo, krom se oni havas grandan idealismon. Do mi supozas ke ĉiu esperantisto estas idealisto, kaptita de io kion ni rajtas nomi "interna ideo". Mi eĉ pensas ke tiu io samas kun la "misteraj fantomoj" de Zamenhof (parolado dum la unua kongreso en 1905).

La kverelo sur teoria kampo estas malnova movada tradicio, kaj ne nepre negativa, se ĝi ne transpaŝas certan limon. Tamen (jen mia "mondsava ideo"!) mi opinias ke ni devus pli konscii ke ni remas en la sama boato. Ne estas neceso elekti el la diversaj opinioj inter si opoziciaj, ja ne nur la mondo grandas, sed ankaŭ unuopuloj kapablas agadi laŭ la cirkonstancoj.

Do, karaj malidealistoj, idealistoj, sektistoj, raŭmistoj, naturalistoj, skemistoj, ĝisostuloj, neologismuloj, "kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj, / Ni ĉiuj de Di' estas filoj. / Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro, / Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro / Al frata la celo ni iru obstine / Antaŭen, senfine!"

Kaj fine iom pri la fina venko. La slogano "dua lingvo por ĉiu" tute ne signifas ke ĉiuj neesperantistoj nepre lernu Esperanton. Tiu slogano nur simple, koncize resumas la konstaton milfoje eksplikitan: se ĉiuj homoj havus almenaŭ unu komunan lingvon, tio estus bona, kaj pro diversaj kialoj nuntempe Esperanto proponiĝas kiel plej simpla, logika, sendiskriminacia solvo. Mi pensas ke nia (jes, *nia*) Nobel-premiito Selten ne pro ĝentileco diris ke ŝajne stabilaj kaj eternaj sistemoj dum mallonga tempo povas renversigi, se interne kuŝas iu nestabileco. Tion pravas la rapida falo de la socialisma bloko, kaj same povas okazi (do ne nepre okazos) rilate la lingvajn problemojn. En tiu momento Esperanto havus grandan ŝancon nur se ni estus prepariĝintaj por la okazo. Do ni ĉiuj streĉu laŭ niaj ebloj la muskolojn kaj remu. Eĉ se ni ne atingos la alian bordon, la remado bone efikas al nia sano.

Csaba Székely

Dumviva Membro

✉ vilte@baja.hungary.net

Baja, Hungario

TEJO-seminario pri informado

"Aŭdigi niajn voĉojn — junuloj kaj amaskomunikiloj"
Budapeŝto (Eŭropa Junulara Centro), 27 aprilo–4 majo

La programo enhavos prelegojn pri teorio kaj praktiko de amaskomunikiloj, de presita ĵurnalo ĝis Interreta revuo. Eblos mem elprovi per duonprofesiaj iloj ĉiun paŝon de la praktiko. Laborgrupoj: verkado de gazetaraj informoj, organizado de gazetara konferenco, intervjuado kaj intervjuiĝo, preparado de TTT-paĝo ktp. La rezultoj de la seminario kolektiĝos en manlibro, disponigota al ĉiuj Landaj Sekcioj de TEJO.

Junaj E-aktivuloj (sub 30 jaroj) loĝantaj en Eŭropo, speciale se ili okupiĝas pri informado en sia E-organizo, aliĝu antaŭ la 31-a de marto ĉe Nóra Csiszár, Erdődy Pálffy T. u. 25, HU-8100 Várpalota, Hungario; ☎ +36/11/412-739 aŭ +36/88/471-095; ✉ (ĉe Budapeŝta Esperanto-Domo): +36/1/282-88-85; ✉ hallo372@osiris.elte.hu.

Kunlaboro devas ebligi ĉe samcelanoj



Jam tre baldaŭ post kiam mi komencis agi por la internacia lingvo, mi spertis ke la tiel nomata "interkompreniĝo" en vero ne tiel okazas kiel

oni povus esperi ĉe homoj kiuj havas — aŭ almenaŭ devus havi — la samajn aŭ similajn celojn. Diversaj homoj (eĉ bonaj esperantistoj) ne povis kaj ne povas kompreni ke oni povas kaj emas labori por pluraj Esperanto-movadoj aŭ -asocioj. Multaj opinias ke oni laboru aŭ por la t.n. neŭtrala movado, por UEA, aŭ por tendenca, kiel la SAT-movado. Dume mi preferas labori por pluraj asocioj, ĉar tiel eblas ricevi multe pli bonan superrigardon pri la tuta Esperanta afero kaj scii kie io mankas. Kaj ĉar mi dum kelkaj jaroj laboris "ĉefofice" por Esperanto, mi ekkonis diversajn problemojn pli bone ol honorofice laboranta funkciulo.

Nun, post baldaŭ kvardekjara laboro por Esperanto, mi komencas kompreni la kialon de la mankohava interkompreniĝo en la E-movado. Anstataŭ konsideri lingvan aferon kiel tian, la homoj projekcias multajn psikajn problemojn al la tuta Esperanto-afero. Anstataŭ membriĝi en politikaj partioj, ili agadas en la Esperanto-movado kvazaŭ en partio, kun la sekvo ke la lingvo estas konsiderata kiel batalilo, kaj la homoj batalas emociplene unu kontraŭ la alia, anstataŭ komune batali kontraŭ la nescio de la homaro. Se oni kolektus la fortojn — kaj tio ja devus esti ebla ĉe samaj aŭ similaj celoj —, tiam bona volo de kelkaj milionoj finfine ne povus resti sen rezulto.

Ĉar mi de longe apartenas kaj al UEA kaj al SAT, mi konas la problemojn de ambaŭ asocioj. La membroj de UEA kaj multaj el la delegitoj konsideras sin "pli bonaj" esperantistoj (malgraŭ ke ili ne ĉiuj regas la lingvon kontentige), kaj la SAT-movadanoj ili ofte opinias duagradaj esperantistoj. Fakte, la SAT-movado jam faris vere multe por Esperanto rilate la kulturon kaj literaturon: rigardu nur PIV kaj multajn aliajn utilajn librojn kaj vortarojn.

Se oni ĉion ĉi vere profunde pripenas, tiam oni absolute ne vidas ian kaŭzon por aroganteco de unu aŭ la alia flanko; cetere, ankaŭ en SAT troviĝas ĉiuj specaj membroj, de laboristo ĝis profesoro. Tamen, ĉe ili la vorto *solidareco* ankoraŭ havas pli grandan valoron ol en aliaj movadoj, verŝajne pro heredaĵo de la sindikata movado.

Ĉe la fino de mia vivo mi volas ankoraŭ ĝui etoson de internacia Esperanto-kongreso, tial okaze de mia 75-jara naskiĝjaro mi invitis la 70-an Kongreson de SAT en 1997. En 1985 mi lanĉis dum la 2000-jara jubileo de Aŭgsburgo la 70-an UK-on, kaj nun mi invitas la trian fojon la SAT-kongreson, ĉi-foje la 70-an, al la sama kongresurbo, Aŭgsburgo. Ĉar ĉi-jare la UK estos en la fora Aŭstralio, la SAT-kongreso havos ŝancon esti vizitata de homoj kiuj kutime vizitas la UK-on, sed pro la granda distanco

ĉi-foje rezignas kaj anstataŭe serĉas alian kongresan semajnon kaj ties etoson. Ni invitas ĉiun esperantiston, tutege al kiu movado li aŭ ŝi apartenas, veni denove al Aŭgsburgo, partopreni la kongreson, eventuale la postkongreson en la Nigra Arbaro. Vi tute certe ne pentos pro la vojaĝo al Aŭgsburgo, kie vin atendos interesaj prelegoj i.a. de la prezidanto de Akademio de Esperanto, d-ro Werner Bornmann, de d-roj Michael Cwik, Reinhard Fössmeier k.a.

Sciu ke parto de la kongresa komitato jam laboris siatempe ankaŭ por la 70-a UK en 1985, do vi povas fidi pri la seriozeco de la preparoj. Havu bonan tempon, restu en bona sano por 1997, kaj bone vojaĝu al Aŭgsburgo. Kontaktadreso:

*Hermann Schmid
Alte Reichsstr. 31f*

DE-86356 Neusäss-Steppach, Germanio

☎ +49/(0)821/488-149 aŭ 792-835

☎ +49/(0)821/713-074

Estingiloj portempe bezonataj



Sendependecon deziras por si ĉiu lerta kaj elpensema homo, ĉar ja estas prave dirite ke nur per la propraj ungoj oni povas bone sin grati. La dis-

volviĝo de Esperanto en Afriko estas firme ligita al tiu sendependeco.

Kiam samideanoj el tiel nomataj pagipovaj landoj cerbumas pri Afriko, ilia unua reago estas: jen sentaŭguloj, almozetantoj; tamen ni ion faru por ili, por konservi la universalecon de Esperantio. Dume Afriko, sklavigita, priŝtelita, daŭre serĉas sian identecon, malgraŭ blinda politikistaro kiu celas nur sian profiton. Jam venis la momento por ekstarti kontraŭ tio kaj elradikigi tiun blindecon — kio gajnis respekton por ni ĉe aliaj. Ne estas ja laŭ la volo de la afrikaj samideanoj ke la lokaj reĝimoj malhelpas eliron el tiu nebulaĵo.

Kiam vi vidas bruli la domon de via najbaro, rapidu kunestingi la fajron, ĉar via estingilo verŝajne pli efikas ol la lia. Portempe ni en Afriko ja

bezonas tiajn movadajn estingilojn kaj alvokas ilin. Tamen, Esperanto en nia kontinento ne estas ia portempaĵo deekstere nutrata, ĝi daŭre disvastiĝas malgraŭ la akraj enlandaj kondiĉoj, kaj longperspektive iam venos la ĉiufanka memstariĝo de la afrika esperantistaro. Paroli dume pri stagnado de la afrika movado servas nur por pligrandigi streĉitecojn. Anstataŭ senkiale akuzi, ni parolu vere saman lingvon, kundividante la saman spiriton kaj saman juĝon.

Nkunku Niansi (Zairio)

**Ĉu vi jam
rekotizis por
1997?**

Se ne, tiu ĉi estas la lasta numero de nia revuo kiun vi ankoraŭ ricevas!



• Angolo: Kabinda klubo

La averaĝa aĝo en la 17-membra Kabinda Esperanto-Asocio (C.P. 262, Cabinda, Angolo) estas 28 jaroj. Siajn sam-asociojn instruas Sona M'Beta (kaŭranta meze, kun belulina mano sur la kapo).

• Ĉeĥio: Postkongresa kongreso

Post fortostreĉa realigo de la 81-a UK en Prago, Ĉeĥa E-Asocio pasigis modestan kaj laborplenan 8-an nacian kongreson (29 nov.-1 dec., Havířov) en ĉeesto de 130 asocioj. Rilate la periodon ekde la lasta nacia kongreso (1993), estis konstatite ke la plej grava tasko, la okazigo de UK, sukcese plenumiĝis; aliflanke, pruviĝis ke la landa movado kapablas kontentige funkcii malgraŭ la maldungo de pagitaj laborfortoj, trudita de la ekonomia realo. Oni elektis novan komitaton, kies prezidanto denove iĝis Vlastimil Kočvara, kaj skizis perspektivon por la asocia agado ĝis 1999. (V. Kočvara)

• Ĉinio-Kroatio: Ambasadora vizito

Laŭ iniciato de Dražen Budiša, vic-prezidanto de la kroata parlamento, la 10-an de decembro la ambasadoro de Kroatio en Pekino, Branimir Strenja, vizitis Ĉinan Esperanto-Ligon por transdoni du ekzemplerojn de la E-lingva *Ano de l' ringludo*, reeldonita okaze de vizito de kroata parlamenta delegacio en Ĉinio (vd. nov., p. 184). Kroata E-Ligo ricevis de la ministerio de eksteraj aferoj oficialan raporton pri la vizito, dum kiu la ambasadoro informiĝis pri la stato de Esperanto en Ĉinio. (S. Štítec)

• Italio: Strato Tellini en Udine

La Esperanto-pioniro, geologo kaj folkloristo Achille Tellini (1866-1938) ricevis omaĝon en sia naskiĝurbo: en ĉeesto de diverslokaj esperantistoj, la 27-an de oktobro oni inaŭguris en Udine straton nomitan laŭ la fondinto de la unua Esperanto-katedro en Italio (Bolonjo, 1912). Same en Udine inaŭguriĝis, la venontan printempon, Esperanto-parko. (*La Eta Gazeto*)



Kabinda E-Asocio



• Junularo: Jubilea, amasa IS

La jubilea 40-a Internacia Seminario (27 dec. – 3 jan., Freiburg, Germanio) elstaris pro aparte granda partoprenantaro (ĉ. 350, el kiuj 75 italoj), simila al la pasintjara rekorda ĉeesto. La populareco de la IS estas des pli rimarkinda ke ankaŭ la lastsomeran Internacian Junularan Kongreson gastigis Germanio. La 41-an IS-on oni aranĝos plej verŝajne en Traben-Trarbach, okazejo de la 32-a IS en 1988/89.

• Literaturo: Du hispanaj konkursoj

En Cheste (Hispanio) naskiĝis la literatura premio "Francisco Máñez", kun la sola premio de 2 000 usonaj dolaroj, transdonota en Valencio okaze de la 7-a Internacia E-Kongreso (8-13 jul.). La verkoj, rilatantaj al la temo "Vivmedio", ampleksu inter 10 kaj 50 paĝoj, kaj estu senditaj antaŭ la 14-a de aprilo. Detaloj ĉe: Sociedad Cultural Ateneo "La Alianza", Plaza Doctor Cajal 11, ES-46380 Cheste (Valencia), Hispanio. (A. Casquero)

• Pakistano: Impona instruado

Pro foresto eksterlande, la ministro pri kulturo kaj literaturo, Fakhar Zaman, malgraŭ promeso ne povis ĉeesti la 19-an Jaran Someran Kongreson (15-16 aŭg., Murree) de Pakistana E-Asocio (PakEsA), sed la partopreno de fama ĵurnalisto, Mir Abdul Aziz, kreskigis la intereson de televido kaj gazetaro. En naŭ monatoj antaŭ la kongreso, ok ĵurnaloj, du semajnaj kaj du monataj gazetoj aperigis ion pri Esperanto: rezulte, 50 homoj kontaktis la asocion kaj lernis la lingvon. Se en iu urbo aperas pli ol 5 interesitoj, Muztar Abbasi, fondinto de la asocio, veturas tien por senpage instrui E-on. 150 personoj sekvas korespondan kurson de PakEsA.

Anstataŭ la adreso en la Jarlibro, oni nun prefere uzu tiun de la Informa Centro de PakEsA: 228, Lower Mall, PK-47150 Murree, Pakistano. (IC de PakEsA)

Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo duan fojon kunorganizas la Tradukan Konkurson José Rodríguez Huertas, pri hispanigo de Esperantlingvaj beletraĵoj, kun premio de E-libroj je la valoro de 20 000 pesetoj (ĉ. 260 gld.). Oni rajtas partopreni per maksimume tri verkoj, sendendaj antaŭ la 31-a de oktobro 1997 al: Sindicato Nacional de Escritores Españoles, Apartado 632, ES-29080 Málaga, Hispanio. Detale informas A.M. González, Apartado 864, ES-29080 Málaga; delpozo@redestb.es; <http://www.redestb.es/personal/delpozo/>.

La pasintjaran unuan konkurson gajnis José Francisco Martín del Pozo, pro sia hispanigo de *La nigra Spartako* de Geraldo Mattos.

• Vortaroj: Publika Padova prezento

La 17-an de novembro en la festosalono de la Komunumo de Padova estis prezentita al la publiko la vortaro itala-Esperanta de Carlo Minnaja (vd. recenzon nov., p. 193). Parolante pri la vortaro post atenta trastudo, la fama itala lingvisto Alberto Mioni difinis ĝin "inter la plej ampleksaj el la itala al iu ajn alia lingvo", kaj aparte laŭdis la italliteraturan apendicon. Ĵurnaloj kaj televido larĝe raportis pri la evento. (C. Minnaja)

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Japanio: Nobuo Sakurai.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Brazilo: C. de Moraes Lemos.

AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: Max Wearing.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Belgio: Alexandre Humet. Britio: J.M. Ibbotson; Martyn Hugh McClelland. Finnlando: Albin Backholm; Tiina Oittinen. Francio: André C.J. Gaillard; Bérengère Cheverry; Claude Longue-Épée; Denis-Serge Clopeau; Gaston Fournier; Gustave Blary; Jean Dalet; Maurice Feneyrol; Odile Masseron; Philippe Berizzi; Pierre du Cheyron; Raymond Despujols; Roger Despiney; Yvette Nicaise-Pierre. Germanio: August Franke; Nora Caragea. Hungario: Péter Pál Denke. Japanio: Hirotugu Hukumoto; Ikuko Kitagawa-Yazima; Zyun'iti Sibayama; Utako Kobayasi; Hiroo Kodama. Nederlando: Hans ten Hagen; Louise Adelaar; Miny Massar-van Diepen; W.L. van Leeuwen. Nov-Zelando: Gwenda Sutton.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Aŭstrio: Sieglinde Stamm. Belgio: Karel Van Steenberghe. Britio: E.E. Mallett; E.R. Waterworth. Finnlando: Aleksii Romonen; Eino Pynnönen; Anna-Liisa Heikkinen; Meri Lehtinen; Veikko Tikkanen. Francio: André C.J. Gaillard; André Loisel; Blaise Berthonneau; Claude Longue-Épée; Clara Troper; Denise M.H. Loisel; Féodor Jelenc; Henriette Cortes; Hélène Gauducheau; Julia Guillaume; Jean-Paul Beau; Louise Marin; Maurice Feneyrol; Odette Bernet; Raymond Boré; Roger Despiney; Julien Ducrocq; Raymonde Perault; Jean-Louis Texier. Germanio: August Franke; Eva Bork. Hispanio: L.E. Hernández García; R. Uruña de Hernández. Hungario: Péter Pál Denke. Italio: Catina Giulia Dazzini. Japanio: Hirotugu Hukumoto; KUROYANAGI Yositaka; Mituo Gotou; Ken'iti Matumoto; Kyôhei Nakazima; OSAKI Kazuo; Nobuo Sakurai; Kôiti Simizu; SIMADA Sunao; Ōoiči Satoo; YAMASAKI Seikô. Luksemburgio: Brian R. Moon; Claude Nourmont. Nederlando: M. van Bentum-v.d.Broek; Dini Kappert; G.A.M. van Bergeijk; Huibert Oortwijn; Hans ten Hagen; Joaquim Calado; Jan Otto de Kat; E.C. Klaver; Louise Adelaar; Joop W. Moonen; Marc van Oostendorp; Simon P. Smits; Wiebren Akkerman; Miny Massar-van Diepen; Gerda H.M. Wulfers-Meddens; Yfke Weidema. Norvegio: Olav Bjørnsrud. Svedio: Martin Häggström; Harald Andersson; Leif Holmlund; Malte Smith; Sam Fritz; Tomas Jansson; Tore Johansson. Svislando: David Cohen; S. Kaufmann; François Randin. Usono: Anne

Whitaker; Cecelia Peterson; Gertrude Novak; Lucille C. Harmon; Margaret L. Barkley; William R. Harmon. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich. Forpasinto: W.A. Verloren van Themaat.

DONACOJ 1996 (gld.)
ĝis la 31-a de decembro 1996

(La tutjaraj sumoj indikas ne la staton de la koncernaj kontoj/fondaĵoj sed la sumon de la donacoj en 1996.)

Fondaĵo Afriko: Anonime: 2500,00. Fondaĵo Grabowski 873,38. Universala Ligo: 7100,00. Finnlando: B. Eriksson 100,00. Nederlando: Konversacia Grupo Nijmegen 388,00. Sumo tutjara 33 218,07.

Fondaĵo Ameriko: Universala Ligo: 7100,00. Finnlando: L. Oterma 234,36. Nederlando: R. van Es 10,00. Sumo tutjara 12 087,45.

Fondaĵo Belartaj Konkursoj: Sumo tutjara 24,00.

Biblioteka Fondaĵo: Nederlando: N. Moerbeek-Bartels 50,00; R. Moerbeek 100,00; F. Zeiler 75,00. Sumo tutjara 300,00.

Fondaĵo Canuto: Anonime: 3006,00. Germanio: F. Coburger 85,40; W. Heinrich 558,73. Japanio: H. Gotou 61,04; N. Hatayama 30,10; K. Hayasi 30,10; T. Huzita 30,10; H. Inumaru 30,52; M. Itabasi 30,10; A. Itagaki 30,52; K. Kazawa 30,06; K. Kenmotu 30,10; Y. Kim 30,39; K. Kobayasi 30,06; T. Matuoka 30,10; Y. Misawa 455,85; S. Miyamoto 30,10; T. Nakamiti 60,12; T. Nisikawa 75,25; T. Nomura 30,06; S. Oonisi 30,06; Y. Oosaki 30,39; M. Saiki 30,52; K. Sanpei 30,06; Y. Takase 29,96; S. Yamasaki 30,06. Luksemburgio: B.R. Moon 100,00. Nederlando: E. Burg 100,00; R. Moerbeek 100,00; Fam. R. Slot 300,00; D. van Zanten 50,00. Svislando: C. Sixtus-Pot 29,04; E. Walder 50,16. Sumo tutjara 16 875,29.

Ĝenerala Kaso: Aŭstrio: V. Wahra 11,13. Germanio: H. Zimmerer 12,11. Japanio: S. Wada 12,50. Nederlando: P. de Blaeij 20,94; A.L. Broekema 200,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; E-Grupo "Merkurio" 500,00; R.L. Hoogendoorn 300,00. Nov-Zelando: T. Jansen 6,00. Svislando: D. Bühlmann 132,00; E. Jayet 5,28; F. Liechti 11,88; P. Rüegg 29,04. Div. malgrandaj: 34,72. Sumo tutjara 9417,53.

Konto Espero: Anonime: 112,20. Finnlando: A. Mehtonen 111,60. Francio: H. Cortes 23,24; C. De Coudenhove 33,20; A. Gaillard 99,60; P. Hamon 13,28; L. Marin 99,60; O. Masseron 33,20; Y. Vidal 66,40. Nederlando: Kolekto Zamenhof-tagita 402,00; E. Burg, G. v.Geffen 50,00; R. Moerbeek 100,00; J. Verheijen 10,00. Sumo tutjara 3661,01.

Fondaĵo Officeja Ilaro: Sumo tutjara 2211,80.

Nova adreso de prof. d-ro So Gilsu: Koguryo Instituto, Hae-yong bld. 1009, 148 Ankuk-dong, Chong-ro-ku, Seoul, 110-240, Koreujo. Tel. (02) 720-6006. Fakso (02) 720-6008. Hejma tel. kaj fakso restas: (02) 646-5413.

Erare aperis en decembro (p. 216) la tel. numero de s-ino SONG Ĝong-ok kaj s-ro Harald Schicke: ĝi estas +49/4263-9408-7, fakso: -8.

Pli ol 20 bulgaraj geknaboj 10-11-jaraj, entuziasmaj, deziras amikiĝi kun ali-landaj samideanoj. Gimnazio "C. Cerkovski", Mariana Genčeva, Esperanto-grupo Verdaĵ Steletoj, BG-5180 Polski Trambeš, Bulgario.

Andy Künzli havas ret-adreson: <andyk.esp@bluewin.ch>.

Serĉas bonan laboron ĉie ajn en la mondo gejunuloj Mohammad Reza Taran kaj Neda Karbalaee Hosein. Industria desegnado (CAD/CAM) & MS-Word 6.0 @ Windows (Writing). M.R. Taran, P.O.B. 315-35-394, Tehran, Irano.

Lernantinoj 10-11-jaraj volas korespondi kun gesamaĝuloj tutmonde. Respondo garantiita. Interklubo Esperanto, 60 Let Oktjabrja 6-135, RU-626440 Nižnevartovsk 6, Rusio.

Junulara Fondaĵo: Sumo tutjara 186,21.

Propaganda Konto: Sumo tutjara 1116,81.

Fondaĵo Saliko: Sumo tutjara 8,56.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Fondaĵo Grabowski 374,30. Japanio: T. Suzuoki 7,56. Luksemburgo: B.R. Moon 100,00. Nederlando: Y. Weidema 100,00. Sumo tutjara 4411,23.

Volontula Fondaĵo: Japanio: J. Brozovsky 100,00. Nederlando: L. Adelaar 50,00; W. Akkerman 146,00; J. v.d. Bos 20,00; J.F.V. Bosse-Sibbel 50,00; J. Braamkolk 75,00; T. Bulk-Beenen 10,00; P.A. Buynsters 12,00; P. Damman 25,00; C. van Dijk 21,00; A.M.H. Dodebier 50,00; C. Duivenvoorden-Kors 50,00; A.J.G. Engel 25,00; A.L. v. Gelder 15,00; M.G. Gijtenbeek 25,00; H. ten Hagen 80,00; Y.G.J. van den Hork 25,00; T. v. Huis-Staritsky 10,00; J.L. Hut 10,00; A.J. Korfage-de Jong 34,00; N.C. Kuiterman-v.Goor 100,00; C.P. Kuppens 9,00; A.W.A. Luiten 4,00; R. Moerbeek 100,00; N. Moerbeek-Bartels 50,00; G. Peet 50,00; J.P. Punt 25,00; P.W. Rietmulder 10,00; C.H. Romijn-Born 4,00; A. Schouten-Buys 10,00; B. Venema-Vroege 10,00; J. Verhoeff 9,00; Y. Weidema 30,00; H. Wernik 25,00; D. v. Zanten 10,00; S.A.K. v.d. Zee 100,00. Sumo tutjara 2269,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Marin BACEV (1927-1996) mortis la 28-an de septembro en Sofio. Li pasigis sian movadan vivon en la servo de la E-instruado, i.a. kiel vic-sekretario (1985-88) kaj ĉiam aktiva membro de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj, respondeculo de Bulgara E-Asocio pri instrumentodiko, ekzamenanto en UEA/ILEI-ekzamenoj kaj delegito pri instruado. Li kunverkis oficialan metodikan gvidilon bulgarlingvan (1983), kuntradukis libron pri la komponisto Dimitar Terziev, *Per flugiloj de la kanto* (1995), kaj redaktis la antologion *Kubaj popoloj fabeloj* (1996). Li instruadis diverslande: en 1990 dum ses monatoj li instru-preparis kubajn e-istojn antaŭ la Havana UK, kaj laste li gvidis kursojn en aprilo-junio 1996 en Litovio.



David MACGILL (Daĉjo, 1915-1996) mortis la 7-an de decembro en Dunedin (Nov-Zelando) sekve de aŭto-akcidento survoje al familia

rekuniĝo. La familianoj funebris lin kaj laŭ maoria kaj laŭ budhisma maniero.

MacGill naskiĝis en Skotlando, sed vivis en Nov-Zelando (1921-77, 1993-) kaj Japanio (1977-93). E-isto de ĉ. 1935, li estis dum multaj jaroj eduka oficisto de la landa E-asocio (ĝis 1973) kaj produktis dekon da sonbendaj kursoj kaj programoj en Esperanto, i.a. *La vivo de Zamenhof*, *La rakonto pri Aojagi*, *Homo kaj La vojaĝo de la maorioj*. Dumviva membro de UEA, li plenumis delegitajn funkciojn de post 1948 seninterrompe: de la 60-jaroj ankaŭ kiel fakdelegito pri vegetarismo kaj budhismo, poste kiel vicdelegito en Kioto. En sia familio li esperantistigis kvar generaciojn: instigis sian patrinon lerni, instruis la lingvon al ĉiu sia infano (inter kiuj denaske al sia famiĝonta filo Stefan), kaj nun liaj nepoj parolas Esperanton denaske. Antaŭ ok jaroj MacGill deponis ĉe la CO de UEA "materialon por nekrologo" kun la rimarko: "utilus se oni petus al aliaj homoj aktivaj simile verki".

Dirk PRINS (1911-1996), delegito kaj fakdelegito pri pasedukado dum kvardeko da jaroj, forpasis la 15-an de septembro en Oosterbeek (Nederlando).

SUMIYOSI Katuya (1905-1996), malnova membro, ofta donacanto, forpasis antaŭ nelonge en Sizuoka (Japanio).

TAKEDA Hiroŝi (1908-1996), dumviva membro kaj estrarano (1971-1980) de Japana E-Instituto, mortis la 26-an de septembro en Matudo.

Willem VERLOREN van THEMAAT (1931-1996) mortis la 6-an de decembro en Amsterdamo. Studinte Esperanton ĉe Sigismundo Pragano en la Amsterdama Universitato (1955-59), li doktoriĝis pri matematiko, fako pri kiu li estis delegito ekde 1961; en 1993 lia delegiteco ŝanĝiĝis al interlingvistika kaj Amsterdamo. Li regule membris en Societo Zamenhof.



Profesie esploristo pri scienco, Verloren van Themaat vaste artikolis en sciencaj revuoj ekstermovadaj kaj en

E-periodaĵoj, ĉefe pri temoj scienc-filozofiaj, interlingvistikaj kaj literaturaj. Li kun-iniciatis kun H. Tonkin la inkluzivigon de E-rilataj eroj en la Bibliografion de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (vd. jan., p. 10). El liaj grandnombraj verkoj elstaras *La akvariinfanoj* (1976), romano pri eksterutera vivtenado de fetoj, la studo *La vicordo de la frazelementoj en E-o* (1973), la eseo *Esperanto: Ideologio kaj kulturo* (1996), la traduko de *Tiele parolis Zaratuŝtra* de Nietzsche (1977, el la germana) kaj de parto de la poezia *Nederlanda antologio*, kies ĉefa kunredaktoro li estis (1987). Li opiniis aparte pluginda kampo la tradukadon de originalaj Esperantaj literaturaĵoj: aperis liaj nederlandigoj de *La infana raso* de William Auld (*Het Kinderras*, 1982) kaj de 16 poemoj en la antologio *Zeg, luister eens* (1981); lia bibliografio de Esperantaj beletraĵoj tradukitaj en aliajn lingvojn aperos ĉe UEA.

Aktiva en Esperantlingva Verkista Asocio, en la lastaj ses jaroj li servis kiel ties sekretario. La asocio Esperanto Nederland, kies rebat-servon li estris, fondis pasintjare la omaĝan premion Verloren van Themaat, donotan ĉiujare al la esperantisto kiu atingis plej trafen prezenton de Esperanto en amaskomunikiloj.

Manuel de Freitas (1910-1996)

Honora Membro de UEA ekde 1947 kaj de Portugala E-Asocio, Manuel de Freitas mortis la 8-an de decembro 1996 en Maia (Portugalio).

Lerninte Esperanton en 1931, jam en la sekva jaro li postsekvis sian mortintan instruiston kiel estro de elementa kurso. Baldaŭ li aliĝis al UEA, fariĝis delegito (ekde 1952 pri bahaismo), kaj servis inter 1938 kaj 1983 kiel ĉefdelegito, poste kiel vicperanto por Portugalio.

Dum la dua mondmilito, laŭ komisio de UEA, Freitas ekspedadis al la familianoj Zamenhof en Varsovio sekajn fruktojn kaj sardelojn, ĝis ilia deporto kaj mortigo en 1942.

En la 40-aj jaroj li tradukis multajn klerigajn libretojn diverstemajn de Agostinho da Silva, ekz. *Lasta vojaĝo*

de Scott (1942), *Vivo de Zola*, *Vivo kaj morto de Sokrato* (1946), *Historio de Usono* (1947), *Historio de la portugala literaturo* (1948), kaj *Galileo Galilei* de Bento de Jesus Caraça (1948). Por publikigi ilin, li fondis Portugalan Eldonan Rondon, kies laboro pezis plejparte sur liaj propraj ŝultroj. Unu fojon la sekreta polico PIDE konfiskis ĉiujn PER-librojn trovitajn en la loĝejo de Freitas.

Freitas instruis Esperanton diversloke kaj verkis sukcesan korespondan kurson. Lia daŭra kaj persista agado en Portugalio des pli meritas admiron ĉar ĝi plejparte koincidis kun la preskaŭ 40-jara diktaturo de Salazar, periodo dum kiu Esperanto estis jen malpermesita, jen apenaŭ tolerata.



KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON – FR-49150 BAUGÉ
telefono : 02 41 89 10 34

Somera Programo 1997

- 12/04 – 19/04 Internacia Renkonto de Infanoj
- 20/06 – 05/07 Internacia Amika Renkonto –
Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj
- 06/07 – 13/07 Kursoj por komencantoj (unua parto)
kaj por praktikantoj
- 13/07 – 20/07 Kursoj por komencantoj (dua parto)
kaj por praktikantoj
“Gramatiko” (André Cherpillod);
“La franca lingvo pere de Esperanto”
(Jeannine Vincent)
- 20/07 – 27/07 Kursoj por komencantoj (unua parto)
kaj por praktikantoj
“Tradukado el la franca lingvo”
(Georges Lagrange)
- 27/07 – 03/08 Kursoj por komencantoj (unua parto)
kaj por praktikantoj
- 03/08 – 10/08 Kursoj por komencantoj (unua parto),
praktikantoj kaj lertuloj
- 10/08 – 17/08 Kursoj por komencantoj (dua parto),
praktikantoj kaj lertuloj
“Kiel komenci instrui Esperanto?”
(Przemek Grzybowski)
- 17/08 – 24/08 Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj
“Ombroj de kulturo”
(Przemek Grzybowski)

Pli detala programo estas havebla kontraŭ respondkupono aŭ
afrankita koverto.



En 1996 250 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA. Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK
kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en
1996 estis bela SZ-globkrajono. La
kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.



Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

Por esti ĝisdata pri la
evoluo kaj faka literaturo
de interlingvistiko kaj
esperantologio

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ


Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.

Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas
kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



Institutio Hodler '68 akceptas pruntojn sen
rento aŭ kun rento de 2% por investi profite
al gravaj movadaj projektoj. Ankaŭ donacoj
estas bonvenaj.

Pasintjare la subvencioj superis 10 000 gld.
Informiĝu ĉe UEA!

Dua, pliampleksigita eldono de dudirekta vortaro
de grava afrika lingvo, fare de renoma lingvisto.

JAN KNAPPERT

Vortaro Esperanto-Suahila

Kamusi Kiesperanto Kiswahili

Eldonis UEA, 1996. 16+158p.
Prezo: 18,00 gld. Triona rabato.




Tiu zumado ion signifas...

WINNIE-LA-PU

AN ESPERANTO VERSION OF
A. A. MILNE'S WINNIE-THE-POOH

Translated by Ivy Kellerman Reed
and Ralph A. Lewin



Illustrated by

ERNEST H. SHEPARD


Edited with an Introduction and Glossary
by Humphrey Tonkin

Reeldonita de UEA, 1992.
Tole bindita kun kromkovrilo. 27,00 gld.

MENDU DE LA LIBROSERVO DE UEA.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

**SESA ELDONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO**



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994
(2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas
la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikajojn.

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko




helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda
Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la
kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬIAKTO

estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legajon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŬIAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1997 KŬIAKTO aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugalia	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

La Adelajda UK proksimiĝas...



**...per
kanguruaj
saltoj!**

Atende al Adelajdo, plibeligu viajn
korespondaĵojn per la glumarko
de la 82-a Universala Kongreso!

Diametro 36mm. Flavo kaj verdo sur blua fono.
Folio de 10 glumarkoj: 3,00 gld.
Triona rabato ekde triobla kvanto.

SENĜENAJ DIALOGOJ

UEA aĉetis la stokon
de ĉi tiu fascina verko
de Alberto Fernández
pri la fundamentaj natur-
sciencaj demandoj (materio,
atomo, tempo, gravito,
evoluo, genetiko, biosfero).
197p. Multaj ilustraĵoj.
La prezo malaltiĝis de
29,70 al 18,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.



Alberto
Fernández

SENĜENAJ
DIALOGOJ

POPULARSCIENTIA ESPLORO
FUNDAMENTAJ
DEMANDOJ

STAFETO